

# *Esperanto* *Internacia*

*Monata organo de Internacia Esperanto-Ligo*

Vol. 3. N-ro 6

Junio 1939

## La Ora Ŝtuparo

de E. PHILLIPS OPPENHEIM



Tradukita el la Angla lingvo de la Esperantista Societo de Romford.



Streĉa romano kun aktuala temo; ĝi pri-  
skribas kiel financisto provis devigi mondpacon.

278 paĝoj. — Bindita 3 ŝ. 6 p., aŭfranko 4 p.

Eldonita de

THE ESPERANTO PUBLISHING CO. Ltd.



Mendu ĉe

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo,

aŭ ĉe via kutima Esperantista libro-vendisto.

AXEL MUNTHE

# Romano de San Michele

El la angla originalo tradukis

JENNY WELEMSKY

*Prezo : bind. 9 ŝ. 6 p., aŝranko 6 p.*

*broŝ. 7 ŝ. 6 p., aŝranko 6 p.*

Eldonita de

LITERATURA MONDO

Mendu ĉe

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo.

NAUM JERUŜALMI

# Merkado la Azenpelisto

ROMANO

El la hebrea originalo tradukis

LEVI WIENER

*Prezo : bind. 4 sil., aŝranko 3 p.*

Eldonita de

N. SZAPIRO, Varsovio.

Mendu ĉe

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO,

Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo.

# Esperanto

## Internacia

**Monata organo de Internacia Esperanto-Ligo**

Eldonanto : Internacia Esperanto-Ligo  
Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo

Adreso de la Redakcio : Teo JUNG,  
Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederl.

Vol. 3. N-ro 6

Junio 1939

## Unu volo - Unu animo !

Ĉu ĝi, pro ofta ripetado, jam sonas bane aŭ ne, sed restas la fakto : Esperanto estas kulturfaktoro unuaranga. Kaj kvankam la pliparto de l' nuntempa homaro ne konscias pri tio, kaj multaj eĉ ne scias pri la ekzisto de nia lingvo kaj movado, Esperanto signifas la falon de l' baroj inter la nacioj, Esperanto signifas la ĉeson de l' nekomprene inter la popoloj, Esperanto — mi asertas eĉ pli kuraĝe — signifas, en la kultura evoluo de la homaro, la finon de malnova, kaj la komencon de nova epoko.

Al kiu tiaj vortoj ŝajnas tro kuraĝaj, eĉ riskaj kaj defiaj, tiu volu iom relegi en la libro de l' historio. Estas ne ĉiam kaj estas ne nur la armiloj kiuj decidas epokon de ĉi tiu historio. Estas pli multe la spirito kiu decidas, kaj ĝi venkas foje kun, aŭ per, sed tre ofte ankaŭ sen, aŭ eĉ kontraŭ la armiloj.

La epokon, en kiu ni ankoraŭ vivas, grave helpis kunkonstrui la invento de Gutenberg. Farita antaŭ 500 jaroj, ĝi influis en ĉiam pli alta grado la jarcentojn venintajn post tiu granda majstro. Ĝuste en niaj tagoj la gazetaro, la libro, la broŝuro, la afiŝo, la flugfolio formas la spiriton de l' homo kiel nenio alia, — bedaŭrinde en ambaŭ sencoj : bona kaj malbona, sed tio ne estas evitebla.

La enkonduko de l' internacia lingvo influos en grado nuntempe neimagebla la post ni venontajn generaciojn kaj jarcentojn. Ankaŭ tiu influo en la komenco ne povas esti granda. Sed ĝi kreskos de jardeko al jardeko, de jarcento al jarcento, kaj man-en-mane kun la ĉiam pliperfektiĝanta tekniko kaj la ĉiam pligrandiĝanta trafiko ĝi nove formos la homon, kaj kreas la novan epokon.

Tion konscii, signifas esti preta ĉion oferi por la efektivigo de l' granda idealo. Ĝi signifas, resti nepre fidela al la afero ekkonita kiel ĝusta, eĉ tra tempoj plej malbonaj.

Rigardante en la esperantistajn gazetojn, ni konstatas kun ĝojo, ke la konscio pri la valoro de nia afero estas forta, kaj ke la volo, persistadi en la batalo por ĝi, estas firma, kaj nepra.

En tiuj ĉi semajnoj kaj monatoj, kiam ŝajnis ke ĉiu sekvonta tago jam povos alporti la fatalon, la esperantistaro montris vere mirigan unuanimecon pri la neceseco de eltenado, — unuanimecon kiu donas la konvinkon ke nek milito nek alia katastrofo eĉ de plej g'anta mezuro povos detruin nian aferon.

Unu volo, kaj unu animo ! Kun tia decidemo ni povas plenfide iri renkonte al ĉia estonteco.

T. J.

D-ro Ivo Lapenna :

# Pli da disciplino !

## Demokratio — Aŭtokratio — Disciplino

Oni povus diri, ke demokratio estas tia sistemo, en kiu la povo apartenas ĉu senpere, ĉu pere al la kolektivo kaj en kiu estas la plej fortaj la sendistinge kaj ĉiurilate egaligaj tendencoj. Kompreneble tiu ĉi difino fiksas nur en la plej ĝeneralaj trajtoj la ĉefajn elementojn de ĉiuj demokratiaj sistemoj, kiuj inter si povas pli aŭ malpli diferenci en siaj neesencaj karakterizoj ne nur laŭ tio, ĉu ili estas aplikataj ĉe tiu aŭ tiu popolo, sed ankaŭ laŭ tio, ĉu temas pri demokratio en la *politika* senco de la vorto, do pri politika reĝimo, en kiu la povo apartenas al la popolo, aŭ pri demokratio kiel *agadsistemo* de diversaj aliaj kolektivaj unuoj, ekzemple de kulturaj, religiaj, klasaj kaj aliaj movadoj, asocioj, societoj, kooperativaj ktp. Tamen en ĉiu okazo, kia ajn estu la koncerna kolektiva unuo, se ĝia regad- aŭ agad-sistemo baziĝas sur demokratiaj principoj, en ĝi devas la povo aparteni al la kolektivo kiel tuto, kaj, por tion atingi, ĝiaj konsistigaj partoj, do la ŝtatanoj, la urbanoj, la civitanoj, la asocioj, societoj aŭ kooperativanoj devas esti samrajtaj kaj kiom eble plej egalaj, aŭ almenaŭ en la sistemo kiel tia devas regi egaligaj tendencoj.

Kvankam la nun dirota ne rilatas plene al nia temo, tamen estas akcentinde, kaj tio estas ankaŭ plene natura, ke, se en unu ŝtato regas politika demokratia reĝimo, ankaŭ ĉiuj aliaj kolektivaj grupoj organiziĝas plej kutime sur demokratia bazo. Kontraŭe, se la ŝtato estas duon-aŭtokratia, pli aŭ malpli diktatoreca, tamen ene de ĝi povas formiĝi diversaj grupoj, bazitaj sur demokratio. En plene aŭtokratiaj ŝtatoj, kaj precipe en la hodiaŭaj, tio ĉi ne estas ebla, ĉar en ili oni la tutan publikan vivon submetas al la samaj principoj, laŭ kiuj estas regata ankaŭ la ŝtato. Konsekvenco de tio ĉi estas, ke en tiaj ŝtatoj oni, eble, povas havi plej diversajn societojn kaj klubojn, sed *kulturajn societojn oni ne povas havi.*

La kulturaj societoj estas tiaj homunuiĝoj, kies celo estas plenumi difinitan kulturen taskon. Tiu tasko regule ne estas konsiderata kiel tre grava aŭ necesa fare de la ŝtatregantoj, nek ĝi estas tro populara en la larĝaj popolitavoloj. Tial ĝian efektivigon oni lasas al la privata iniciato, al la opuloj, kiuj por pli efike atingi ĝin organiziĝas en diversaj societoj. En tiaspecaj societoj la opuloj devas pli aŭ malpli doni ĉu materiajn rimedojn ĉu siajn intelektajn aŭ fizikajn fortojn, kaj ili regule ricevas absolute nenian rekompencan, krom eble la morala kontenteco, ke ili plenumas utilan kaj por la homaro necesan taskon, kiu alimaniere ne estus efektivebla.

Se oni nun konsideras, ke nur la vere demokratiaj sistemoj permesas plenan pensoliberecon, do ankaŭ la opiniliberecon pri tio, kio estas fakte kultura kaj utila por la tuto, dum en la aŭtokratiaj ĉio ĉi dependas de la plene memvola opinio de la t. n. « gvidantoj », estos tuj klare, ke en tiuj ĉi lastaj sistemoj unu grandega parto de la kulturaj societoj jam pro tiu ĉi kaŭzo tute simple ne estas ebla. Sed ĉar en la aŭtokratiaj ŝtatoj ĉio, kion la gvidantoj opinias utila por plifortigo de sia povo, do ankaŭ diversaj demandoj el la sfero de kulturo, estas transdonita en la manojn de la ŝtato, *tial kulturaj societoj en la vera senco de tiu ĉi esprimo entute ne ekzistas nek povas ekzisti en ili.* Krom tio se ili principe eĉ povus ekzisti, ili devus esti bazitaj sur aŭtokratiaj principoj kaj tial neniu volus libervole aliĝi al ili, ĉar neniu volas libervole submetiĝi al ordonoj de unu persono rilate al la aferoj, *por kiuj li devas oferi kaj nenian materian rekompencan ricevi.*

Kiel, do, ni vidas, sole la vere demokratiaj politikaj sistemoj ebligas la formigon de plej diversaj, kaj, kio por ni estas aparte grava, precipe kulturaj organizaĵoj. De la alia flanko nur tiuj kulturaj organiz-

aĵoj, kiuj sian internan vivon starigas sur la principojn de demokrateco, povas bone progresi kaj atingi sian celon; kontraŭe la aŭtokratemo de opuloj aŭ la aŭtokratio kiel sistemo devas ruiniĝi ilin.

Oni tamen absolute ne rajtas intermiksi la vorton « aŭtokratio » kun la vorto « disciplino », kiel ofte tion faras multaj personoj. Disciplino signifas obeon al certaj reguloj, principoj aŭ decidoj, tute egale kiu kreas aŭ alportas ilin. Sekve disciplino povas ekzisti en aŭtokratiaj same kiel ankaŭ en demokratiaj sistemoj. Tamen inter ambaŭ ekzistas grandega enhava diferenco: *la unua estas sekvo de disciplinigo, la dua de disciplinemo*; la unua estas rezulto de la aŭtokratia sistemo, la dua estas *fundamenta bazo* de la demokratio; la unua estas *devige altrudita*, la dua *libervole akceptita* por la bono de la kolektivo. La decidojn, kiujn devas obei disciplinita (aŭ -ema) homo, alportas en aŭtokratiaj sistemoj la opulo, dum en la demokratiaj ili estas esprimo de plimulto post detala kaj plene libera antaŭdiskuto.

Evidentas kaj klaras, ke precipe en la kulturaj organismoj, kiaj estas ankaŭ niaj esperantistaj socioj, absolute devas regi disciplino, se oni fakte volas atingi pli bonajn sukcesojn. Tiu ĉi disciplino devas signifi ne submetiĝon kaj obeon al ordonoj de tiu aŭ tiu opulo, sed *libervolan akcepton de la decidoj de la plimulto*, kiuj estas kreitaj post serioza, detala kaj plene libera preparolo de la decidota afero. Antaŭ la decido oni lasu al ĉiu diri sian opinion, sed post la decido absolute ĉiuj obeu la opinion de la plimulto, *ĉar en tia okazo tiu ĉi opinio estas fakte samtempe opinio de la kolektivo kiel tuto*. La ĵus preparolita obeo ne signifas malfortecon de la karaktero, sed kontraŭe treege grandan forton kaj *profunde enradikigitan konscion pri la sociaj devoj*.

Resumante ĉion diritan, ni konstatas, ke nur la demokratio kreas konvenan atmosferon por grandskala kultura progreso; ke ĉiuj kolektivaj organismoj, dezirantaj atingi difinitajn kulturajn celojn kaj plenumi certajn kulturajn taskojn, devas baziĝi sur la principoj de demokratio; fine, *ke la demo-*

## Esperanto — ponto kaj savilo

Antaŭ kelkaj tagoj mi vojaĝis vagonare tra la glorplena florkampa regiono de Nederlando. Kontraŭ mi, ĉe la fenestra angulo, mi rimarkis kun intereso malhelbrunan sinjoron kiu legis gazeton, supozeble sialandan: « Il Corriere d'Italia ».

Sentante la bezonon esprimi al la fremdulo mian admiron pri la « ĉiuprintempa holanda gloro », mi penis serĉi en la fundo de mia memoro la italan egalon de « bellega », — kaj fine, kredante esti trovinta la ĝustan vorton, mi riskis, kun signifoplena sentimentala tono: « bellissimo »!

Sed, ho, jen... alfluis en m'ajn orelojn rapida parolo signifanta: ĉu vi parolas itale? Mi komprenis sed sentis min, mizera, ke mi ne kapablas ion respondi, kvankam iam lerninte iom la italan lingvon.

Sed subite mi repensis pri tio, ke Esperanto ja plej similas la italan, kaj mi daŭrigis la konversacion... esperantlingve. La rezulto? Nu, la italo, tute frmda al la mondlingva afero, povis sufiĉe bone kompreni min. Fariĝis do interesa, amika interparolo — ankaŭ bonpropaganda, ĉar la kunvojaĝantoj turnis al nia flanko siajn mirantajn okulojn.

Kaj jen la plej bela: kiam ni lasis unu la alian en Leiden, mia kunvojaĝinto kaj mi sentis, ke ne estis renkontiĝintaj italo kaj franco en ŝovinisma tempo, sed homo kun homo, dank' al Esperanto.

Konkludo: en multaj cirkonstancoj, karaj gesamideanoj, uzu nian karan mondlingvon! Esperanto estas ponto kaj savilo.

Roland Dupuis.

---

*kratia sistemo povas doni bonajn fruktojn kaj entute esti ebla nur en la okazo, se la membraro de la koncerna kolektivo estas disciplinema kaj se ĝi havas antaŭ siaj okuloj ne la individuajn senperajn interesojn, sed la interesojn de la kolektivo kiel tuto kaj apenaŭ pere de ĝi la interesojn de si mem kiel konsistigaj ĝiaj partoj.*

Disciplinon en la ĵus preparol'ta senco de la vorto ni sendube urĝe bezonas ankaŭ en nia movado.

**JOSEPH R. SCHERER, Prez. de EANA :**

## Esperanto en grava filmo

# Esperanto-Dialogo en la M. G. M. filmo « Idiota Amuzo »

(Verkita por ĉiuj Esperanto-gazetoj kiuj deziras uzi la enhavon.)

En antaŭaj artikoloj mi klarigis jam multajn detalojn pri la grandskala M.G. M.-filmo « Idiota Amuzo ». Mi priskribis, kiel mi devis dungi taŭgajn geaktorojn por la Esperantaj dialogopartoj, kial reĝisoro Brown decidis uzi nian lingvon, kaj kiel vi povas plej efike venigi la sensacian filmon al viaj kinejoj ie ajn en la ankoraŭ libera mondo. Mi skribis pri la 2,000 gratulleteroj, kiuj venis el ĉiuj mondpartoj, kaj ankaŭ jam aperis artikoloj pri intervjuoj kun Reĝisoro Brown kaj Norma Shearer.

Sed nun la filmo baldaŭ estos montrata en Eŭropo, kaj mi do hodiaŭ volas doni al la legantoj la plej gravajn partojn de la Esperanta dialogo, por ke ankaŭ tute novaj gesamideanoj povu facile kompreni la nature-fluegan lingvon, kiu aŭdiĝas en diversaj partoj de la filmo.

La unua parto de la filmo montras, kiel « Harry », usona soldato (Clark Gable) revenas de la « lasta » mond milito al Nov-Jorko kaj fariĝas amuzeja aktoro. Li renkontiĝas kun la akrobatino Irene (Norma Shearer) kiu dum unu semajno ludas en la sama amuzejo. Ŝi multege admiras la aktoron Harry... sed dum multaj jaroj ili ne plu revidas unu la alian.

En 1939 Harry vojaĝas tra Eŭropo kun ses belegaj usonaj blondulinoj por ludi en amuzejoj de diversaj landoj. Jen vagonaro veturas tra neĝkovrita altmontaro en imagita « Sennoma Lando ». Harry Van kaj la ses belaj blondulinoj malkomforte sidas en triaklasa vagono inter gekampanoj kiuj inter si parolas en Esperanto :

**Dikega kampanino :** « Mi diras al vi, se la milito venos, ni restos ekster ĝi. Lasu aliajn batali inter si ĝis la morto. Estos des pli bone por ni ».

**Oficiro :** « Eble ni ne kapablos resti ekster ĝi ! »

Post kelkaj momentoj la trajno subite haltas abrupte. Harry plendas angle pro la tro multaj haltoj. Demandas la

**Oficiro :** « Kion vi diras ? » Sed Harry ne komprenas la demandon.

**Trajna konduktoro** (kriante tra la vagonaro) : « Monta Loda! Ĉiuj eliras tie ĉi ! La trajno ne iras pluen ! Ĉiuj eliras ! »

Pakajisto ĵetas la kofrojn de la ses knabinoj kaj Harry el la pakajvagono. Harry angle forte protestas kontraŭ tia detruiga traktado, sed la pakajisto per fluega Esperanto respondas :

**Pakajisto :** « Foriru, vi granda ĝenulo ! Ĉu vi ne vidas ke mi estas okupata ? Se vi volas scii kio ĝenas vin, iru konsulti bonan doktoron, sed haltu ĝenu min ! »

Post kelkaj momentoj Harry denove plendas, kaj denove, eĉ pli kolere, diras la

**Pakajisto :** « Foriru, vi granda ĝenulo ! »

Hotela bonvenigisto, kiu estas usonano kaj do fremdulo en tiu ĉi lando, vokas al portisto per (intence) hezitema Esperanto :

**Hotela bonvenigisto :** « Portisto ! Kofrojn de... s-ro Van... al la hotelo ! »

Post kiam kelkaj turistoj jam alvenis en la preskaŭ fermita sezona mont-hotelo, subite forta sirena bruo aŭdiĝas de la flugkampoj kiu kuŝas profunde en la valo.

**Hotelestro** (krias ekscitite) : « Ho, tiom da bruo, tiom da konfuzo, kaj nun la sireno ! »

Sur la flugkampoj, kiu estas kaŝita profunde en la valo inter altegaj montoj, oni vidas amasojn da militaj aeroplanoj, kiuj sin preparas por atakoj kaj detruu la ĉefurbon de najbara lando.

Baldaŭ poste alvenas per eleganta aŭtomobilo la plej timata municiaĝento de Eŭropo, kiu tie kaj ĉie incitas militetojn,

por ke la diversaj registaroj aĉetu ĉiam pli da municio. Kun li estas tre eleganta « edzino », kiu estas « rusa altnobelino » kies onklo estis la caro de Rusujo.

Sed Harry tuj suspektas ke ŝi estas la iama akrobatino kiu lin admiris antaŭ multaj jaroj en Usono. Sed li ne estas certa; kaj ŝi tute ne konsentas koni lin.

Antaŭ la vespermanĝo subite alvenas majoro de la flugarmeo por venigi la kelkajn flug-oficirojn kiuj trinkas ĉampanon en la hotela trinkejo. Jen sekvas tre vigla Esperantlingva dialogo :

**Oficiro :** « Atenton! »

**Majoro :** « Ordonoj ĵus venis ! Al niaj postenoj ! »

**Oficiro :** « Sajnas ke la milito eksplodis ».

**Majoro :** « Jes ».

**Diversaj oficiroj** (unu post la alia, dum kiam ili forlasas la hotelon rapide) : « Mi esperas pri bona batalo ! Mi ĝojas ! Mi estas kontenta ! Mi estas feliĉa ! Gloro al nia lando ! »

Pli malfrue en la vespero, kelkaj oficiroj venas al la hotelo, dum kiam oni dancas en la luksa trinkejo. Alvenante ili diras inter si :

**Oficiroj :** « Vidu ! Belegaj blondaj dolĉulinoj ! Ili estas Amerikaninoj ! »

Certe ili venas de Hollywood ! Prezentu nin al ili !

Kapitano, ni deziras renkonti ilin ! Iom da ĉampano por ni ĉiuj, kaj ankaŭ por la belegaj fraŭlinoj ! »

**Kapitano** (Josef Schildkraut) : « Vi renkontos ilin post la danco ! »

Ofte ĉe eŭropa prezentado kelkaj film-partoj kaj do ankaŭ kelkaj frazopartoj estas eltranĉataj. Mi ne povas kontroli, ĉu eble kelkaj Esperantaj vortoj malaperos.

La oficiroj estas senpaciencaj kaj tuj deziras danci kun la knabinoj, sed... subite alvenas « fanatika » pac-propagandisto, kiu blasfemas la flugoficirojn, angle kriante al ĉiuj gastoj, ke ĝuste de tiu ĉi flugkampano iris aeroplanoj por detruiri najbarajn urbojn, kaj ke do tiuj ĉi oficiroj estas murdistoj ktp...

La oficiroj estas konsternitaj. Ili ne komprenas la anglan lingvon. Demandas

**La oficiroj :** « Kion li diras ? »

La kapitano kaj aliaj gastoj klopodas kvietigi la pac-propagandiston. Sed li nun eĉ pli furioze insultas la oficirojn. Do diras

**La Kapitano :** « Forprenu lin ! » (Li estas mortpafota.)

En sekvanta sceno oni vidas kiel la oficiroj ankoraŭ dancas kun la usonaj belulinoj, longe post la noktomezo. Ĉe la fino de unu tia danco :

**Diversaj oficiroj :** (al la fraŭlinoj, duonlaŭte, ĉiuj samtempe : « Dankon pro la danco. Vi mirinde dancis. Ĉu vi volas ion trinki nun ? Venu ion trinki ! Bonan ĉampanon, jes?... » (La frazoj ne aparte kompreniĝas.)

En la sekvanta tago la turistoj fine ricevas la permeson daŭrigi sian vojagadon. Sed la municio-agento postlasas en la hotelo la « rusan altnobelinon », ĉar hieraŭ ŝi kuraĝis kulpigi lin pro la nova mondmilito. Li respondis ke li admiris ŝin pro ŝia kapablo fari la plej mirindajn mensogojn kaj ke pro tio ŝi estis al li tiom utila helpantino. Hodiaŭ li rifuzas garantii por ŝia pasporto kiu ne estas en ordo.

Kiam Harry vidas la mizeron de Irene, li proponas helpi al ŝi, kaj post longa hezitado ŝi fine konfesas, ke, jes, ŝi estas la iama ruĝhara Irene kiun li konis en Usono. Do Harry decidas resti kun Irene en la forlasota hotelo.

Subite ekaŭdiĝas kolosa bruo. Malamikaj aeroplanoj venas por detruiri la flugkampon en la valo. Jen kelkaj pliaj Esperantaj vortoj :

**La Majoro :** « Estas la bombaeroplanoj ! Ili venis ! »

**La Kapitano** (Schildkraut) : « Al niaj postenoj ! Rapide ! »

**La Hotelestro :** « Subenigu la kurtenojn, rapide, rapide ! Esingu la lampojn ! Rapide ! Al la kelo ! Rapide ! »

Irene mirakle saviĝas spite de la kompleta detruo de la luksa hotelo. Ĉirkaŭbrakante sin en la teruro, ili rimarkas ke la aeroplana bruo mallaŭtiĝas. Por eltiri sin el la freneziga terurigo Harry proponas al Irene, ke ili kune laboru kiel « famaj mens-divenistoj » en grandaj amuzejoj. Do ĝis la lasta momento Harry kaj Irene en la koroj estas amuzegaj geaktoroj.

# Esperanto en Brazilo

El Brazilo denove atingas nin agrablaj sciigoj. Jus ni aŭdas ke — laŭ propono de Prof. Jonathas Serrano — la Organiza Komitato de la 8-a Monda



## EMINENTA AMIKO DE ESPERANTO: D-ro JOÃO MARQUES DOS REIS

*Direktoro de la Brazilia Banko,  
Eksministro  
de Trafiko kaj Publikaj Laboroj.*

Kongreso de Edukado, okazonta en Rio-de-Janeiro dum la monato aŭgusto nunjara decidis alpreni Esperanton, kiel unu el la oficialaj lingvoj de la kongreso. Tiun decidon, kune kun aliaj, oni sendis al la Monda Federacio de Edukaj Asocioj en Usono, kiu iniciatis la edukadajn kongresojn, por fina aprobo.

La prezidanto de la Organiza Komitato estas Prof. Fernando de Azevedo kiu, kiel direktoro de la Publika Instruado en Rio-de-Janeiro, akceptis la proponon de Prof. Jonathas Serrano por la uzado de Esperanto en la Lerneja Interkorespondado, kaj vicprezidanto Prof. M. Lourenço Filho, unu el la aprobintoj de la rezolucio de la Brazilia Konsilistaro de Edukado. Apartenas al la Organiza Komitato ankaŭ D-ro Mario Teixeira de Freitas, ĝenerala sekretario de la Brazilia Instituto de Geografio kaj Statistiko.

★

Alia ĝojiga informo estas ke lia ekscelenco s-ro D-ro Getulio Vargas, prezidanto de la Brazilia Respubliko, sin bazinte sur tre favora propono de la Socia Konsilantaro, kiu lin rimarkigis pri la propagando por Brazilo, kiun delonge faradis Brazilia Ligo Esperantista, decidis triobligi la subvencion, kiun de multaj jaroj ricevas tiu ĉi Ligo. Kvankam la subvencio per si mema ne estas tre granda (ĝis nun ĉ. 56 dolaroj), tamen la fakto estas signifa.

★

Unu el la plej eminentaj amikoj de Esperanto en Brazilo certe estas s-ro D-ro João Marques dos Reis, nuna direktoro de la Brazilia Banko kaj eksministro de Trafiko kaj Publikaj Laboroj. Li eldonigis du poŝtmarkojn kun teksto en portugala lingvo kaj Esperanto pri la Specimena Foiro de Rio-de-Janeiro kaj la poŝtmarkojn memorigajn de la 9-a Brazilia Kongreso de Esperanto kaj de la Ora Jubileo de Esperanto. Li estis la patrono de la peto de Brazilia Ligo Esperantista al la ministro por Edukado, D-ro Gustavo Capanema pri la Lerneja Interŝtata Akordo.



# Esperanto-Kongresoj kaj Libertempejoj 1939

## « ESPERANTO-TAGO » DUM LA NOVJORKA MONDFOIRO.

S-ro R. M. Pease, la prezidanto de la Aranĝa Komitato de l' 32-a Nordamerika Esperanto-Kongreso, raportas la jenon :

Longan tempon mi esperis enkonduki Esperanton en la « New York's World's Fair 1939 » ; sed dum pli ol unu jaro estis neeble sen 5000 dolaroj (tio estas la kosto de la plej malgranda loko por ekspozajo).

La 32-a Kongreso de la Esperanto-Asocio de Norda Ameriko okazos en Novjorko la 1-3 julio. Tiurilate, mi estas elektita prezidanto de la Aranĝa Komitato kaj, kiel tiu, mi jus povis aranĝi oficiale ke la Foiro nomos la 3-an de julio « Esperanto Day » (Esperanto-Tago). Ni festos tiun tagon kiel eble plej multe. Matene oni senpage transportos ĉiujn anojn de la kongreso de la Kongresejo (New Yorker Hotel) en la Foirejon kaj atentigos ilin pri la interesajoj de la Foiro ĝis tagmezo. Ĉiuj manĝos kune en la restoracio de la Svislanda Domo. Posttagmeze okazos granda publika kunveno kun belaga programo de internacia karaktero, taŭga por Esperantismo. Vespere estos grandioza festo, la klimakso de la kongreso, en la Winter-Wonderland-restoracio de la Foiro.

(Estas, do, rekomendinde ke tiuj samideanoj, kiuj intencas viziti la Mondfoiron, t. e. la Universalan Ekspozicion de Novjorko, aranĝu ĉeesti la 32-an Kongreson de EANA kaj la « Esperanto-Tagon » je la 3-a de julio. — Adreso : Local Congress Committee, H. W. Smart, 147 So. Oxford Street, Brooklyn, N. Y.)

## 15-a KONGRESO DE ORIENTFRANCA FEDERACIO.

Ĝi okazos la 11-an de junio en Saverne, sub la honorprezido de la urbestro, en la salonego de la urbdomo. La malferma kunsido estos disaŭdigata de Radio-Strasbourg je 9.30-10.00 MET kaj somera GMT. Post la festeno, kiu estos en Hotelo de la Gare, la kongresanoj ekskursos al Hohbach, pitoreska loko en la ĉirkaŭajo de Saverne.

Oni povas sin turni al jena adreso : S-ro Marcel Zimmermann, 10, rue des Abeilles, Colmar (Ht.-Rhin).

## BALTLANDA ESPERANTO-KONFERENCO.

Litova Esperanto-Asocio invitas al vizito de la Baltlanda Esperanto-Konferenco, kiu okazos en la kadro de (neesperantista) Balta Semajno

kaj de la Jubilea Kongreso de Litova Esperantistaro, en Kaunas, la ĉefurbo de Litovio, en la tagoj 9-11 junio. Oni esperas ke ankaŭ multaj latvaj kaj estonaj ĝesamideanoj partoprenos.

Adreso : Litova Esperanto-Asocio, Zemaičiu g. 15, Kaunas.

## ESPERANTO-SEMAJNO SUR HERZBERG.

Ĝi okazos post la Universala Kongreso en Bern, la 5.-12.8.1939, en la Popola Altierno sur monto Herzberg en la bela Jura-montaro (Aargau, Svislando). Dum la libertempa semajno oni povos partopreni kursojn kaj prelegojn de la konata franca Cseh-instruisto Roland Dupuis, kaj ankaŭ paroladon de D-ro Fritz Wartenweiler, la « spirita patro de la popolaltierneja ideo en Svislando ».

Oni povos loĝi en la altiernejo aŭ en la apuda junulgastejo. Laŭ tio la kostoj varias inter 35 kaj 45 svisaj frankoj, ĉio enkalkulita. Sed oni povos ankaŭ mem prepari siajn manĝojn, kaj ankaŭ kunporti tendon; tiukaze la kostoj estos minimumaj.

Petu detalan, ilustritan prospekton de : S-ro Walter Kobelt, Landstrasse, St. Margrethen; aŭ de : S-ro Otto Walder, Wiesenstr. 56, Bern. Ambaŭ en Svislando.

## ESPERANTISTA LIBERTEMPEJO ANKAŭ EN USONO : ĈE BAHAA SOMERA LERNEJO EN GREEN ACRE.

Kurso por komencantoj, instruota laŭ la Cseh-metodo, okazos ĉe la Bahaa Somera Lernejo en Green Acre, Maine, ekde la 26-a de aŭgusto dum ok tagoj. La instruistino estas f-ino Roan Orloff, kiu faris provlecionojn antaŭ grandaj aŭdantaroj en du el la gravaj preĝejoj de Boston dum la lastaj monatoj, kaj ankaŭ gvidas kurson en la Universitato. Ŝi estas sukcesa instruistino dum multaj jaroj.

La kurso estos senpaga; oni nur pagos por la loĝado. Ĝi okazos en tre bela loko ĉe la bordo de rivero en la kamparo. Oni esperas ke multaj el la usnaj esperantistoj ekkaptos tiun ĉi okazon por ebligi al ŝi instrui laŭ tiu sukcesa kaj alloga metodo. Ĉiuj, kiuj ĉeestis klasojn instruitajn laŭ la Cseh-metodo de taŭga instruisto, konfesos ke ĝi estas unu el la plej sukcesaj iloj por la esperantistigo. Tio estas tre grava por Esperanto en Usono. Ĉiuj, kiuj havas intereson por la kurso, skribu al f-ino Marjory Wheeler, 84 Pleasant Street, Worcester, Mass., por aranĝi pri loĝado dum la kurso.

## 31-a Universala Kongreso de Esperanto Bern, 29 Julio - 5 Augusto 1939.

### NOVA INFORMILO.

**Adreso por leteroj** : 31-a Universala Kongreso de Esperanto, Bern.

**Kotizoj** : Sv. fk. 30.— La edzo aŭ edzino, same gejunuloj ne pli ol 20-jaraj, pagas la duonon de tiu ĉi sumo.

Plej oportune vi pagas al nia poŝtĉeka konto III 11611, aŭ per monbiletoj, aŭ al Schweiz. Volksbank, Bern.

**Pagejoj** : por Britujo, B. E. A., 142, High Holborn, London W.C.1 ;

— por Danujo, Dansk Esperanto-Rejsebureau, Jernbanegade 22, Nykøbing F ;

— por Estonio, Esperanto-Asocio de Estonio, Postkast 6, Tallinn ;

— por Nederlando, Vojaĝoficejo de «LEEN», v. Tuyl v. Serooskerkenplein 33, Amsterdam-Z ;

— por Norvegujo, Esperanta Turista Komisiono, Boks 353, Stabekk ;

— por Polujo, Inĝ. Michał Chmielinski, ul. Krasniskiego 4, Torun ;

— por Svedujo, Esperanta Turista Komisiono, Tegelbacken, Stockholm ;

— por Francujo, SFPE, 34, rue de Cnabrol, Paris 10.

**Aliĝiloj** estas haveblaj ĉe la kongresoficejo, ĉe la landaj Asocioj, ĉe la turistaj komisionoj kaj ĉe la IEL-centra oficejo.

**Blinduloj** kaj ties gvidantoj pagas kotizon de sv. fk. 5.— Ili devas sendi ateston ke ili estas blindaj, subskribitan aŭ de IEL-delegito, aŭ de blindula instituto, aŭ de kuracisto.

La Blindula Asocio (svisa) promesis zorgi por la loĝado, se eble senpaga, de la kongresanoj.

**Glumarkoj**, efika propagandilo, 100 ekzempleroj kostas sv. fk. 1.20 aŭ 4 int. respondkuponojn.

**Donacoj** helpas sukcesigi la kongreson. La organiza komitato antaŭdankas al donacantoj. Sumo de la ĝis nun ricevitaj donacoj : sv. fk. 70.30.

**Blindula kaso** : Helpu ebligi al blinduloj la kongresviziton ! La komitato danke akceptas donacojn por tiu kaso. Donacoj ĝis nun ricevitaj : sv. fk. 106.—

**Loĝado kaj manĝado** : Vidu la favorajn aranĝojn en numero 2 de « Ni vokas vin ». Mendilo estis sendata kun n-ro 4.

**Fakaj kunvenoj** : Organizontoj tuj anoncu siajn dezirojn. Lasta dato : fino de junio.

**Karavanoj** : Ni estas informataj pri karavanoj el la jenaj landoj : Britujo, Danujo, Estonio,

Francujo, Nederlando, Norvegujo, Svedujo kaj Usono. La adresojn vidu sub « pagejoj », krome : J. Telling, Schietbaanlaan 106-a, Rotterdam-C., kaj G. A. Connor, 162 West 13 Street, New York City.

Por landoj nemenciitaj informiĝu ĉe la firmo Cook pri karavanoj.

**Skolta tendaro** : Informojn petu de f-ino G. Merz, Falkenweg 9, Bern.

**Oficiala kongresgazeto** estas « Ni vokas vin ». La proksima numero aperos dum junio.

**Vizoj** : Kongresanoj el Bulgarujo, Grekujo, Hispanujo, Jugoslavujo, Polujo, Rumanujo, Rusujo, Turkujo kaj Sennaciuloj prezentu en svisa ambasadorejo aŭ konsulejo sian kongreskarton por ricevi senpagan vizon. Kongresanoj el aliaj landoj ne bezonas vizon por eniri Svislandon.

**Piesajoj** disdonotaj en la kongresejo aŭ en kongresaj kunvenoj devas esti aprobitaj de la kongresa komitato.

**Dokumentaro** : La sama postulo rilatas al presajoj disdonotaj kun la oficialaj kongresdokumentoj. Ili devas ricevi la antaŭan aprobon de la LKK kaj devas aŭveni plej malfrue du semajnojn antaŭ la kongreso.

**Kongreslibro** : Pro tro granda pezo ĝi ne estas forsendota antaŭe al la kongresanoj. Ĉiuj necesaj informoj aperos en la antaŭkongresa numero de la gazeto.

**Aliĝoj** : Ĝis 15.5.1939 aliĝis 581 personoj el 24 landoj.  
La sekretario :  
Otto WALDER.

### UZO DE ESPERANTO POR BIBLIOGRAFIA SERVO, PRECIPE SUR SCIENCA KAMPO.

La Estraro de IEL konfidis al D-ro I. Lappenna, Zagreb, kaj al mi mem la taskon prezenti dum laborkunsido de IEL, dum la venonta Universala Kongreso en Bern, raporton pri la supre citita temo.

Mi petas ĉiujn samideanojn, kiuj posedas dokumentojn tiurilate, ke ili bonvolu sendi ilin al mi. Se ili deziras ricevi la dokumentojn, ili bonvolu tion klare menci, kaj indiki klare sur ĉiu dokumento siajn kompletajn nomojn kaj adresojn.

D-ro P. KEMPENEERS,  
19, Av. Montjoie,  
Uccle 3, Belgujo.

BONE ARANĜITA ESPERANTO-OFIGEJO :

## Ĉu nia movado ĝin perdos aŭ konservos ?



La Esperanto-movado en la nuna Ĉeĥomoravio (Protektorato Bohemio kaj Moravio) ankoraŭ ne estas oficiale malpermesita, kaj la ĉeĥaj samideanoj esperas ke ili povos daŭrigi sian laboradon. Ni ricevis de ili la jenan leteron :

« Vizitintoj de Praha certe bone konas la asociajn ejojn kaj kunvenejojn. Ĉeĥoslovakaj samideanoj kun granda klopodo kaj senlaca laboro aranĝis belan Esperantan oficejon en la koro de Eŭropo. Laŭ la bildoj represitaj en ĉi tiu gazeto vi vidas bone aranĝitajn ejojn de la asocio, kaj estas nun la demando, ĉu ili restos konservataj al nia movado, aŭ ĉu ni ilin perdos.

Post la teritoriaj perdoj de la lando, kaj entute pro la okazintaĵoj en la pasinta jaro kaj nuna marto, ankaŭ nia movado perdis grandan nombron de siaj anoj. La resto de la asociaj membroj ne povus facile havigi la necesan sumon por pagi la jaran luprezon de 6000 kronoj (preskaŭ 400 guldenoj). Do, la asocio sin turnas al vi, karaj samideanoj, kun la peto, ke vi afable subtenu finance, laŭ viaj ebloj, Esperantan entreprenon, kiu ĝuste en la nunaj cirkonstancoj povas havi tute eksterordinaran signifon por nia movado. Ni estus al vi kore dankemaj en la espero, ke ni alimaniere repagos nian ŝuldon al vi ĉiuj, kiuj nun helpas al ni. Ni estas esperantistoj — do ni esperas je baldaŭa renaskiĝo de nia kvinpinta, verda stelo ! »

Nia kliŝo montras la bonaranĝitan oficejon de la ĝisnuna EACSR. Sur la unua bildo oni vidas la fronton ses-fenestran kiun okupas la oficejo en la dua etaĝo de Truhlářská 16, Praha II. Dekstre supre la librovendejo. Malsupre la oficejo kun koridoro kaj (dekstre) kunvenejo.

# Esperanto vivas

## 18 PRELEGOJ EN ESPERANTO PRI NEDERLANDO.

Antaŭ iom da tempo estis fondita, en Hago, komitato por la praktika utiligo de Esperanto por nederlandaj interesoj. En la komitato havas lokon, inter aliaj, la urbestro de Hago, s-ro de Monchy; la direktoro de la Philips-fabrikoj, inĝ. Otten, kaj la direktoro de K.L.M. (Reĝa Aertrafika Kompanio), s-ro A. Plesman. Unu el la unuaj rezultoj de la fondo de tiu komitato estis prelegvojaĝo de s-ino J. C. Isbrücker, direktorino de la Internacia Cseh-Instituto de Esperanto, dum marto kaj aprilo tra Danlando. Entute ŝi faris 18 prelegojn en 16 lokoj, krom unu intervjuo (ankaŭ en Esperanto) ĉe la dana Radio.

## KIAM LA STATO PAGAS LA KURSKOSTOJN...

300 kursanoj en 14 diversaj lokoj — tiun nombron povas noti niaj gesamideanoj Weide kiel rezulton de sia lastvintra laborado. Al fin-festo en Ringköbing venis preskaŭ 200 gastoj, malgraŭ tio ke la distanco de kelkaj el la kurslokoj al la urbo estas tre granda.

La lastvintra laboro de ges-roj Weide okazis en la kadro de la vespera lernejo. Tio volas diri: ne la lernantoj, sed la ŝtato pagas la kostojn de la kursoj. Tial oni povis okazigi la kursojn dum pli multaj horoj ol se la lernantoj mem devus pagi ĉion. La sekvo kompreneble estas pli bona matureco de la lernantoj.

La bona sukceso de ges-roj Weide estas ankaŭ nova pruvo por tio ke Esperanto en Danlando bone progresas.

## ESPERANTO-ASOCIO EN MAROKO OFICIALE SUBTENATA.

En 1937 s-ro Thollet organizis en Port-Lyautey unuafoje Esperanto-kurson; kune kun s-ro Assayaĝ li aranĝis duan kurson en 1938; ĉi-lastan kurson partoprenis 70 personoj, el kiuj 20 akiris la ateston pri lernado. Post la dua kurso fondiĝis asocio « La Verda Stelo », kiu kunvenas ĉiusabate. Dum kunveno de la « Conseil du Gouvernement » en Rabat, s-ro Navailles brile paroladis pri Esperanto kaj atingis ke la estraroj konsentis subvencii la asocion per 500 frankoj.

## F.L.E.-Kongreso en Arnhem

Paskon okazis en Arnhem la 24-a Kongreso de la Federacio de Laboristaj Esperantistoj en la teritorio de la nederlanda lingvo. La kongresanojn akceptis kaj alparolis en la urbodomo la urbestro s-ro Bloemers. 900 personoj ĉeestis la interfratiĝan vesperon; 611 aliĝis al la kongreso.

El la malferma parolado de la kongresa prezidanto, k-do Veen, ni citas jenajn vortojn:

« La pasinta jaro ne montris sin favora al progreso de Esperanto, ne nur en la Federacio, sed ankaŭ ĉe ĉiuj aliaj organizoj. Esperanto konformiĝas al plej alta idealo, la paco. La nuna militdanĝera tempo grave influas. Esperanto ja pli bone povas disvastiĝi en paca sfero. Ni tamen konsciu, ke **nia energio, destinita en la nuna prena tempo al nia movado, parte des pli efektos. Kiam la premo torĝos, nia kolektita energio ebligos la venkon de Esperanto.** »

La kongreso de FLE denove pruvis la forton de tiu ĉi organizo, pri kiu akiris plej grandan meriton ĝia antaŭa prezidanto, s-ro Faulhaber, nun elektita de la kongreso kiel honora prezidanto de la Federacio.

En la venonta jaro la FLE-kongreso okazos en Amsterdam.

## La Esperanto-Semajno en Barry

Dank' al la iniciato de la Esperanto-Grupo de Barry (Glam.) kaj de la Esperanto-Federacio de Suda Kimrujo kaj Monmouth, okazis en Barry de la 7-a ĝis 15-a de aprilo perfektiga kurso, gvidita de s-ro Pragano. Ĝuis la kurson 25 kursanoj, ne nur de la regiono sed ankaŭ el Newcastle, Southend, Bishop Auckland Oxford, Chester, Leeds. Temis ne nur pri gramatikaj problemoj sed ankaŭ pri la historio de nia movado kaj pri la Esperanta literaturo. La prelegoj okazis dum la matenoj; ekskursoj posttagmeze; vespere ludoj kaj teatraĵetoj.

Esperantistoj en aliaj regionoj de nia lando devus imiti la ekzemplon de Barry kaj starigi perfektigan kurson, gvidotan de s-ro Pragano, kiu estas eminenta esperantisto. Estas malfacile imagi ke li povus paroli pli flue kaj pli elokvente en sia propra lingvo.

---

# Unueco estas Forto

---

# Nia Esperanto-filmo

« La klara spirito, la freŝa kuraĝo, la certa mano, la flegma sango, fulmrapida manipulado post la unua medito: tio estas kio la operaciiston faras. »  
 新鮮ナル勇氣 明朗ナル精神  
 確實ナル腕 冷静ナル血  
 一處熱慮ニ後 電光石火ニ技  
 カレンツ試ヲ看テ 造ルモノゾ

« La klara spirito, la freŝa kuraĝo, la certa mano, la flegma sango, fulmrapida manipulado post la unua medito: tio estas kio la operaciiston faras ». Tiun gvidsentencon afiŝis **D-ro H. Shinoda** esperant-kaj japanlingve sur la muro de l'preparejo en la operacia salonego de la **Shinoda-Hospitalo en Yamagata**, kies vicdirektoro li estas. D-ro Shinoda estas fervora esperantisto kaj sperta kirurgo-ginekologo, kiu ĉiujare faras pli ol 400 laparotomiojn.

La dua bildeto montras partoprenintojn de la **Esperanto-Semajno en Barry (Glam.)**, Suckimrujo, Britujo, bone sukcesinta sub la lerta gvido de s-ro S. Prignano (plej dekstra de la meza vico). Partoprenis entute 25 personoj, inter ili 12 ĉeestis la tutan kurson, kaj ili estis tiel kontentaj, ke ili petis novan kurson post la Brita Esperanto-Kongreso en Weston-super-Mare.

Bele estas ludi per ŝtelo kaj fosileto, kiam oni estas ankoraŭ tiel malgranda bubo kiel **Pierre-Andre Fink**, la filo de nia kunlaborantino s-ino Irène Fink en **Casablanca, Maroko**. Ni vidas la etan Pierre André ĉi tie sub la gardo de sia indigena vartistino. Pierre-André ĵus ricevis ankaŭ fratineton. Cetere, li intencas, iam fariĝi eminenta esperantisto.

(Tria bildo.)

« Leert Esperanto » (Lernu Esperanton!) estas alvoko kiun niaj ĝokoraj nederlandaj samideanoj, **ges-roj M. Koopmans el Hu zum** (Frislando), per sia aŭtomobilo disportas en ĉiujn regionojn kiujn ili trapasas. (Lasta foteto.) Tio estas moderna propagando tre efika, jam praktikata de pluraj samideanoj en diversaj landoj. Ĉiuj esperantistaj aŭtomobilposedantoj imitu!



# RIFUĜONTOJ I

Ni ricevis la sekvantan informon de la Melbourne Esperanto-Klubo (Aŭstralio), kaj ĝi certe estos tre utila al tiuj, kiuj havas amikojn kiuj deziras transmigri. Kiam oni deziras skribi al Aŭstralio, oni povas ŝpari minimume tri semajnojn sendante la leteron al la Centra Oficejo de I. E. L. (Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo), kiu transsendos ĝin *aerpoŝte*. Tiukaze bonvole kunsendu unu respondkuponon kontraŭ la afranko.

I. E. L.

★

La Komitato por Rifuĝontoj de la Melbourne Esperanto-Klubo, Aŭstralio, konsilas :

1. La registaro de Aŭstralio nuntempe *IN-VITAS* la enmigradon de rifuĝontoj, sed nur laŭ kondiĉoj ne facile plenumblaj.

2. Se la rifuĝonto havas 1,000 funtojn (mil funtojn) aŭ pli, skribu al THE MIGRATION BRANCH, AUSTRALIA HOUSE, STRAND, LONDON W.C.2., ANGLUJO, kaj eble la eniro en nian landon estos iom faciligita. La sumo de mil funtoj devas esti la privata posedajo de la rifuĝonto kaj en formo de valoro *TRANSIGEBLA AL AŬSTRALIO*.

## Por rifuĝontoj — ĉu riĉaj, ĉu malriĉaj.

3. Por komenci la aferon skribu al la plej proksima Brita Konsulejo aŭ al THE MIGRATION BRANCH, AUSTRALIA HOUSE, STRAND, LONDON W.C.2., Anglujo, klare montrante la sekvantajn d talojn :

Nomo : (ekzemple : **SMIDT** Petro — familia nomo en majuskloj aŭ en larĝaj presliteroj).

Aĝo : ..... jaroj.

Adreso : .....

Nacieco : ..... aŭ eksnacieco : .....

Sekso : .....

Okupo : .....

Religio : .....

Aliaj faktoj (**mallonge**).

Nepre skribu klare — kursive, se eble!

4. La Brita Konsulejo aŭ la Migration Branch informos la petinton pri la necesaj kondiĉoj, kies ĉefaj punktoj estas :

a) Rasaj kaj Politikaj Rifuĝontoj el Germanujo, Aŭstrujo, Ĉeĥo-Slovakujo, kaj ankaŭ Poloj, Rumanoj, Hungaroj kaj Italoj ricevos nedefinitan preferon; aliaj enmigros laŭ ordinaraj kondiĉoj.

b) La enmigremulo povu prezenti ateston pri bona karaktero.

c) Li (aŭ ŝi) havu permeson surteriĝi en Aŭs-

tralis (Angle : landing certificate or permit).

d) Li ne registru ŝiplokon antaŭ ol li povas, ĉe la haveno de la surŝipiĝo, montri al la ŝipkompania komizo por registroj dokumentojn pruvantaj ke li havas permeson surteriĝi.

e) Li ne ricevu permeson surteriĝi, se li ne havas en fakta posedo (t. e. transigebla al Aŭstralio) minimume 200 funtojn (ducent funtojn), se li ne havas garantianton en Aŭstralio; aŭ nur 50 funtojn (kvindek funtojn), se li havas tian garantianton.

f) Li ne havu permeson surteriĝi en Aŭstralio, se li ne povas certigi al la doganoficiro, ke li efektive havas tiun sumon.

g) Se la enmigremulo eniras sub la protekto de garantianto, ĉi tiu garantianto kontraktu, ke la enmigremulo ne lariĝos ekonomie dependa de la ŝtato dum kvin-jara periodo post eniro.

5. **MALRIĈAJ RIFUĜONTOJ**, sen amikoj en Aŭstralio, devas sendi peton al la DEPARTMENT OF THE INTERIOR, CANBERRA, A.C.T., AŬSTRALIO, kaj ankaŭ povas serĉi konsilon kaj helpon per skribo al THE SECRETARY, VICTORIAN INTERNATIONAL REFUGEE EMERGENCY COUNCIL, MELBOURNE, AŬSTRALIO — aŭ, por Germanoj aŭ eks-Germanoj, kiuj volas enmigri en la Ŝtato New South Wales, al la GERMAN EMERGENCY COMMITTEE, SYDNEY, AŬSTRALIO.

6. Kiam oni ricevas la permeson, oni devas sendi unu funton (£ 1) al la DEPARTMENT OF THE INTERIOR, CANBERRA, A.C.T., AŬSTRALIO.

7. En okazo de neordinara prokrasto inter la konsento pri permeso kaj ricevo de ĝia skriba transdono al la enmigremulo, aŭ en okazo de rifuzo aŭ malakcepto, amikoj de rifuĝontoj-petantoj devas skribi al VICTORIAN REFUGEE APPEALS COMMITTEE, 169 EXHIBITION STREET, MELBOURNE, AŬSTRALIO. Skribe donu ĉiujn detalojn jam donitajn al la DEPARTMENT OF THE INTERIOR, laŭ dokumento 40, kaj aliloke.

La « Appeals Committee » ne povas doni personajn intervjuojn, t. e. antaŭ la plenumo de skriba informo.

8. Numero 7 precipe koncernas amikojn en Aŭstralio. Ili devas kontakti kun COMMONWEALTH INVESTIGATIONS DEPARTMENT BRANCH en la Ĉefurbo de la Ŝtato, en kiu ili loĝas, aŭ kun la DEPARTMENT OF THE INTERIOR, CANBERRA, A.C.T., AŬSTRALIO, por havigi al si dokumenton 40

(du ekzemplerojn). Ili respondu zorge al ĉiu detalo de la dokumento 40 kaj sendu ĝin al Canberra.

★

### GENERALA INFORMO.

La supra informo estas represebla kaj en Esperantaj gazetoj kaj en nacilingvaj gazetoj. Efektive, represo estas petata.

La esperantistaro en Aŭstralio ne estas granda laŭ nombro aŭ laŭ posedaĵoj, kaj tial ne povas fariĝi mem garantiantoj, kiom ajn ili tion dezirus.

Enmigremuloj, kiuj volas enmigri en Aŭstralio, devas uzi siajn proprajn tortojn kaj iniciatemon por batali sian vojon.

La Esperantista Komitato de la Melbourne Esperanto-Klubo estas preta ricevi monon por enmigremuloj kaj deponos ĝin en sekura Banko en Aŭstralio por individuoj kaj zorgos, sen individua respondeco, pagiĝi tian monon al la enmigremulo post lia enmigro.

MELBOURNE ESPERANTO-KLUBO,  
P.O. Box 2212 T, Elizabeth Street,  
Melbourne, Aŭstralio.

## Kolonio « Bona Espero »

### S-ano BRAGA KUNHELPIS AL LA FONDO DE ESPERANTO-KOLONIO EN BRAZILIO.

Certe vi legis la artikolon pri la Esperanto-kolonio fondota en Brazilo. Kaj jam hodiaŭ ni povas sciigi la tutan esperantistaron, ke ni ricevis el Brazilo la sciigon, ke s-ano Braga, la konata probatalanto por nia movado, havis sukceson ĉe la brazila ministrejo por eksterlandaj aferoj, ricevante la enirpermesojn por la unuaj koloniistoj de la unua Esperanto-kolonio en la mondo, de la kolonio « Bona Espero ».

Kvankam ni ĝis hodiaŭ ne scias, kiam ni — la unuaj koloniistoj, ĉ. 25 personoj el 6 diversaj landoj — povos forveturi, tamen tiu ĉi sukceso de s-ano Braga estas granda antaŭenpaŝo.

Publike mi dankas al s-ano Braga en la nomo de la nun fondita kolonio pro la helppreteco de li pruvita. Lia nomo ĉiam estos kunligita kun la Esperanto-kolonio en Brazilo.

Samajn grandajn servojn faris por la kolonio s-ano Deckers, Catalão (Brazilo), kiu elpensis la projekton de la kolonio, kiu dum preskaŭ du jaroj laboris por la realigo de la fondo, kiu ne timis monelspezojn kaj ne perdis la kuraĝon ĝis la nuna sukceso. Ankaŭ al li koran dankon! Dankon ankaŭ al li pro la de lia posedaĵo donita tereno, kiu estos la fonduso de la kolonio.

Estas la devo de la samideanoj en la tuta mondo, sendi dankleterojn al s-ano Braga, Rio de Janeiro (Brazilo), rua José Vicente 79, kaj

al s-ano Deckers, Catalão (Goyaz, Brazilo), Chacara do Sol.

Komenciĝas en nia movado tute nova epoko! Dum kiam en kelkaj landoj oni malpermesis kaj eble en aliaj malpermesos la Esperanto-organizaĵojn, dum oni enkarcerigas samideanojn nur pro sia aneco al nia movado, dum la tuta mondo febre amas kaj preparas novan te.uran mond-militon, dum malaperas ŝtatoj de la landkarto, estas fondata paca angulo, flanke de la militema mondo.

Ĝis nun nur sonĝo, sed baldaŭ realeco, vera **Esperantujo**, — unue malgranda kolonio, sed poste ĉiam pli grandigota.

Tie ĉe Catalão samideanoj el diversaj landoj kunvivos kaj inter si nur parolos nian karan lingvon. La tuta Esperanto-movado turnos la okulojn al tiu ĉi punkto de la tero dum la venontaj monatoj kaj jaroj, kaj ĉiuj veraj samideanoj atendos kun intereso la sciigojn pri la kolonio.

Ni scias, ke ni havas antaŭ ni treege malfacilan laboron. Ni devos konstrui domojn por ni, ni devos prilabori la ĝis nun ne kulturitajn kampojn, ni devos serĉi aĉetantojn por la produktoj de niaj kampoj ktp., ktp. Sed tamen ni tre volonte faros tiujn ĉi laborojn. Ĉar ni esperas, ke ni povos vivi tute trankvile, sen militdanĝero, sen la danĝero, esti enkarcerigitaj pro nia kredo al nia ideo. Antaŭ ni ĉiam flirtos la standardo de nia verda stelo kaj ni ĉiam pensos al la vortoj de nia majstro: En la mondon venis nova sento! La interna ideo estu inter ni!!!

Al la samideanoj en ĉiuj landoj de la terglobo ni vokas: Helpu al ni!!! Kolektu monon por la Esperanto-kolonio! Se ĉiu nur donos kelkajn centimojn, ni estos treege dankemaj kaj ni akceptas ankaŭ la plej malgrandan sumon. La kolonio havas bankkonton ĉe la: Amsterdamsche Bank N. V., Amsterdam C., sub la nomo: Kolonio « Bona Espero ».

Verdlegiano 2.

## RIFUĜONTINOJ

Ni informis en antaŭa numero, ke ni havis bonan sukceson trovante laboron por rifuĝontinoj, kiuj estas pretaj veni al Anglujo kiel domservistinoj, ktp.

Ni nun devas informi pri novaj reguloj de la brita registaro pri tia enmigro. Virino, kiu deziras enmigri tiucele, devas esti inter 18-jara kaj 45-jara; krome ŝi devas esti fraŭlino, vidvino aŭ ekседzino. Se ŝi estas edzino, la « Home Office » nur donas permeson, se ŝia edzo jam estas en Anglujo.

I.E.L., Rickmansworth, Anglujo.

# NI RECENZAS

**P. E. Stojan** : **Antikva strukturo de la lingvo Vindiana.** — 21 paĝoj multobligitaj. Prezo 1 resp.-kupono. Eldono : Takeuĉi Tookiĉi, Kaga Yamashiro, Japanujo.

La lingvo Vindiana estas nova termino de la aŭtoro, per kiu li volas anstataŭigi la kutiman nomon « hind-eŭropa » aŭ « indo-germana » lingvo.

La studo, kiu celas malkovri la harmonian sistemon de la son-idea rilateco de la pra-hind-eŭropa (Vindiana) lingvo, estas eksterordinare interesa, kaj la konstatoj de la aŭtoro estas kelkriate surprizaj.

« La grava bazo de la vindiana studo » (skribas la aŭtoro mem) « estas konsideri la sonojn ne kiel aŭdatajn aer-vibradojn, kompreneblajn por la orelo, sed kiel internajn organ-fortojn, sentebajn nur por la parolanto mem. En tiu interna organ-funkciado estas la solvo de la son-idea rilateco. »

Se la hipotezoj de Stojan pruvigu ĝustaj, eĉ se ne centprocente, ni devas supozi ke la komuna lingvo de niaj prapatroj antaŭ miloj da jaroj estis tute grandioza artaĵo, ne plu atingita de kiu ajn lingvo posta. Kaj oni devas serioze sin demandi, ĉu tia lingvo ideala povis esti tute libere evoluinta, laŭ la hazardo, aŭ ĉu ĝi estis siatempe vole kreita, de lingvo-ĝeniulo kiu eĉ multe superis la geniecon de Zamenhof?!

En la romano « Landoj de l' Fantazio » mi skizis alian « idealan » lingvon; tio estus lingvo, konstruita el la plej ordinaraj sonoj en maniero kiel eble plej taŭga por teorio kaj praktiko. Ĝia gramatiko estus bazita sur plej granda racieco, sed ĝia vortaro — sur la impresado de la sonoj, t. e. ĝuste sur la son-idea rilateco! En mia junaĝo, antaŭ pli ol 25 jaroj, mi oferis multajn vesperojn kaj dimanĉojn, kiuj kunkalkulte sumiĝas je semajnoj kaj monatoj, por « eltrovi », por konstrui tiun ĉi idealan lingvon; ĝi estis nur teoria okupo kvankam interesega — poste la vivo postulis mian tempon kaj laborforton por pli praktika laborado. Sed ĝuste pro miaj tiamaj okupoj la verketo de Stojan interesis min tute speciale.

Mi ne dubas, tamen, ke ankaŭ aliaj trovos ĝin interesa.

**Bern, Svislando.** 16-paĝa faldprospekto (19,5 × 21 cm) pri nia nunjara kongres-urbo. Dukolore presita. Riĉe ilustrita per trideko da belaj kliŝoj. Oni informas ke ĉi tiun novan prospekton ricevos, pro malgranda eldonnombro, nur la kongresanoj, kiam ili venos al Bern. Aldonitaj estas 6-paĝaj « Informoj » kun ĉio nepre sciinda pri la Berna sezono 1939.

**Litovaj popolkantoj.** Tradukis kaj kolektis P. Lapiénė. 40 p. 15,3 × 23 cm. Prezo 1,50 lid. Eldonis : Litova Esperanto-Asocio, Kaunas.

En aŭtuno 1938 aperis amplekseta kolekto « El litova poezio », de la sama kompilinto. « Litovaj popolkantoj » estas represaĵo el tiu pl: ampleksa kolekto kiu enhavis ankaŭ multajn specimenojn el la arta poezio.

La jena libreto prezentiĝas en plaĉa aranĝo, kun diversaj inicialoj kaj vinjetoj, arte desegnitaj, sur kiuj nur iu regule revenanta simbola figuro misformita kaŭzas strangan, eĉ timigan impreson.

La kantoj estas specimenoj de tipe popola poezio, plejparte tre simplaj, ofte simbolaj; kelkaj estas veraj perloj. Estus bone, se la esperantistaro vaste interesiĝus pri tiaj folkloraj verkoj, kaj se similaj kolektoj povus aperi pri ĉiuj popoloj.

M.

**D-ro Maurits Sabbe** : **Vitina koro.** El la flandra lingvo tradukis D. Mortelmans. 26 p. 13,5 × 19,5 cm. Prezo 5 belg. frankoj. Eldonis : Katolika Esperanto-Instituto, 14, Egied Segerslaan, Wilrijk, Belgujo.

Unuakta teatraĵeto por kvar personoj, prezentanta la batalon de juna fraŭlino por sia amo kaj amato kontraŭ geonkloj kiuj havas pri tio alian opinion; sed la onklo poste aliĝas al ŝia flanko, kaj fine ankaŭ la onklo estas venkita. Drameto taŭga por esti prezentata, kaj ne nur de katolikaj rondoj.

Bedaŭrinde la stilo diversloke estas tre frazeeca (kompreneble pri tio kulpas la originalo), kaj tio ne akcelas facilan paroleblon. Restis ankaŭ, malgraŭ ke la korektlegon prizorgis kvar samideanoj, pluraj pres- kaj aliaj eraroj, ekz. : Tiun kolerelverŝadon tuj forpasos. — Ĉiam ja sufoki kion volas ekflori..., k. a.

M.

**Julie Šupichová** : **Zajímáte se o Esperanto?** 96 p., 15 × 10,8 cm. Eldonis : BES (Bohema Esperanto-Servo), Pošštejn. Prezo 6 kr.

La lerta propagandistino de Esperanto, konata precipe pro sia agado por nia afero en la gazetaro, pritraktas en ĉi tiu libreto per 150 demandoj kaj respondoj (ĉeĥlingve) la historion kaj organizon de la Esperanto-movado, la Esperantan literaturon ktp. La verketo aperis en momento kriza por la Esperanto-movado en la ĉeĥaj landoj. Malgraŭ tio estas esperinde ke ĝi ankoraŭ povos plenumi sian celon. La prezo estas tre modera. la presado bona. Ĉiu ĉeĥa kaj slovaka samideano devus posedi la verketon.

M.



**Elin Pelin** : **Kvar rakontoj**. Tradukis el bulgara lingvo kun permeso de l' aŭtoro At. D. Atanasov (Ada). 31 p. 12×16 cm. Prezo unu resp.-kupono. Havebla de la aŭtoro, adr. : Gladston 48, Sofio, Bulgarujo.

Kvar rakontoj de konata verkisto. La du unuaj prezentas (kiel skribas la tradukinto en antaŭparolo) « humore kaj en ioma grado sarkasme momentojn el la vivo de l' monaĥoj ». La tria priskribas la antaŭgelojn kaj malgelojn de edziniĝonta instruisto. La kvara denove estas sarkasma skizo, ne pri monaĥoj sed pri advokato.

La traduko estas bona; sed min ĝenis du-tri-foja manko de subjekto pronoma en dependaj propozicioj, kaj unufoje erara uzo de « ĝis ne » anstataŭ « dum ne » (Al virino dispremu la kapon, ĝis ne estos malfrue). M.

**J. B. Gresset** : **Ver-Vert**. Poemo en kvar kantoj, el franca lingvo tradukis Célestin Rousseau. 32 p. 13×21 cm. Prezo 4 fr. fk. Eldonis: Esperantista Centra Librejo, Paris.

Gustidire tio ne estas poemo sed rakonto pri papaĝo kiu vivis en monaĥinejo, estis same babilema kaj same pia kiel la monaĥinoj sed — post kelktaga ŝipvojaĝo — forgesis ĉiujn piajn parolojn kaj anstataŭe lernis blasfemojn kaj malĉastajojn. Kiam, punite, ĝi (la verketo nomas ĝin « li ») refariĝis pia kaj ree estis dorlotata, pro subita transiro « de longa malgaja dieto al amaso da sukeraĵoj, supersatigita je dolĉaĵoj » li mortas.

Sprita, iom satira rakonto, bone tradukita. Min nur ĝenis la konservado de francaj « Odyssée, Enée » ktp. anstataŭ Odiseo, Eneo. Kaj kial « Teĉlo » anst. Teklo? Ĉu oni povas diri « la pentinta birdo finfine refariĝis si (ĉu ne: li?) mem »? M.

**TAGE-Biblioteko**. — **N-ro 1. D-ro Ad. Ferrière** : **Kiel eduki niajn infanojn?** Revolucio en edukado per celkonscia, centrigita laboro. — 72 p. 13,3×19,3 cm. Prezo 0.80 gld. — Eldonis: Esperanto-eldonejo J. Muusses, Purmerend, Nederlando.

**Suuren keksinnön uljas voittokulku**. (Triumfo de la granda invento.) Finnlingva flugfolio pri Esperanto, eldonita de Suomen Kirjeopisto en Uusikaupunki.

**Wenn jedermann Esperanto lernte...** (Se ĉiu lernus Esperanton.) Flugfolio germanlingva, verkita de A. B. kaj eldonita de Esperanto-Gesellschaft Zürich, prez. D-ro M. Jaccard, Vögelsangstr. 11, Zürich, Svislando.

**Kopenhago**. 10-paĝa faldprospekto en Esperanto, kun urboplano kaj utilaj informoj. Eldonita de la Turista Unuiĝo de Danlando, Bernstorffsgade 8, Kopenhavn V.

**Bernardo Ojasono** : **Pasoj ĉe pordegoj**. Unua akto de dramo. 24 p. 13×19,5 cm. Prezo ne indikita. Propra eldono de la aŭtoro : B. Ojasono, Haimre as. pk. 11, Märjamaa, Estonio.

Komencinte legi tiun ĉi verketon, mi baldaŭ ĉesis, ĉar ĉio konfuziĝis en mia kapo. Diru al mi, kara leganto, kiu lingvo estas tio? :

**La pordegiŝto**. (Rigardante tra l' vazistazo pordego.) Kiu as la urĝa enristo?

**La sama**. Mesaĝo as de la popolo pri ĝiaj bezonoj k' senord'.

Aŭ : L' vojaĝon ag via agordo do faru ĝis tiu lim'! —

Esperanto tio certe ne estas.

Mi havas komprenon por tio, se iuj lingvo-profesoroj, ne povante distingi sufiĉe klare la limojn inter teorio kaj praktiko, konstruas novajn « mondlingvojn » kaj eĉ klopodas ilin enkonduki; sed mi restas tute senkomprena, se esperantisto provas enkonduki en nian lingvon siajn personajn fantaziojn, kiujn tamen neniu imitos! Kial forjeti monon por la presigo de libro kiun neniu volos aĉeti? T. J.

**Plzen**, la urbo de la fama pilsena biero kaj de la Ŝkoda-fabrika, eldonis tre belan faldprospekton en Esperanto. Pro la ŝanĝitaj cirkonstancoj politikaj oni supergluis la indikon « Ĉ. S. R. » sur la titola paĝo por la vortoj « Protektorato Bohemujo kaj Moravio ». — Estas rekomendinde ke ĝuste nun multaj samideanoj el la tuta mondo petu la esperantlingvan prospekton de : Cizinecká a propagační kancelář Smetanovy sady 2, Plzen, Bohemio, Grandgermanio.

**Aarhus smilets by**. Ilustrita faldprospekto de la dana urbo Aarhus, en lingvoj dana, germana, angla kaj franca. Oni enmetis en ĝin specialan folion « Suplemento Esperanta ». Petu la prospekton kun la esperantlingva suplemento de : Aarhus Turistforening, Aarhus, Danlando.

**Esperanto**. 5-taga internacia ferirestado marborda en la agrikultura kaj mastrumada lernejo de Risskov/Aarhus, Danlando, 2.7.-1.8.1939. — Kaj : 10-taga internacia restado iagborda en Ry Popola Altlernejo inter Aarhus kaj Silkeborg, Danlando, 1.8.-11.8.1939. — Du prospekt-oj 4-paĝaj, ilustritaj. — Krome du diversaj poŝtkartoj. — Interesuloj petu ĉion de : Ges-roj Grönborg, Rcsenvej 8, Risskov St., Danlando.

**L'Esperanto dans l'armée française. Documents officiels**. 23 p. multobligitaj. Grava dokumento, en la lingvoj franca kaj esperanta apudmetitaj. Prezo 5 fr. francoj, afr. Eldonis : Esperanto-Office, 63, rue de Patay, Orléans, Francujo.

# ESPERANTO EN RADIO

## ESPERANTO-RADIO-PROGRAMO.

(Junio 1939).

Horindiko laŭ MET (Mez-Eŭropa Tempo) kiu samtempe estas ankaŭ somera GMT (Greenwich-Meridian-Tempo). Nederlandanoj aldonu 20 minutojn. Ni ne menciis la ekster-eŭropajn staciojn.

### Regulaj dissendoj.

**D i m a n ĉ e :**

8.45- 9.00 LiLe 247 : Kurso aŭ prelego.

9.15- 9.25 Kortrijk 204 : Kurso aŭ informoj.

22.40-23.00 (KRO) Hilversum 1875 kaj Jaarsveld 415 : Prelego.

**L u n d e :**

21.50-22.10 Roma 2 RO 6 (19.61) kaj 2 RO 9 (31.02), eventuale ankaŭ Roma II (245) . Politikaj informoj.

22.45-23.05 Paris PTT 431 : Varia Esperanto-programo. (La 19.6. dissendota per Radio Paris 1648 m., eble je 23.00.)

**M a r d e :**

22.00-22.10 Tŭri 410 ; Tartu 579 ; Tallinn 229 : Esp.-kroniko.

**M e r k r e d e :**

18.15-18.30 Montpellier 224 : Kurso.

**Ĵ a ŭ d e :**

9.30- 9.45 Paris 431 : Esp.-kurso.

**S a b a t e :**

18.40-19.00 Roma II (245) ; IRF (30.52) kaj 2 RO 9 (31.02) : Turisma kroniko.

### Aliaj dissendoj dum junio.

4.6. 20.45-21.10 Budapeŝt II : Baghy-vespero.

22.00-22.30 Bulgaraj stacioj 253, 235 kaj

35.4 : Kultura revuo.

7.6. 22.00-22.30 Bulgaraj stacioj 253, 235 kaj

35.4 : Prelego.

10.6. 16.10-16.30 (VARA) Hilversum 301 :

Prelego.

11.6. 9.30-10.00 Strasbourg : Malferma kunsido

de la Orientfranca Esp.-kongreso.

16.6. 20.20-20.45 Budapeŝt II : Prel-go pri « La

reĝino de la Danubo ».

21.6. 22.00-22.30 Bulgaraj stacioj 253, 235 kaj

35.4 : Prelego.

24.6. 16.10-16.30 (VARA) Hilversum 301 :

Prelego.

30.6. 22.50-23.00 Ljubljana : Prelego.

## LA JUNIA ESPERANTO PROGRAMO

### DE PARIZO.

5.6. Esperantista Kabareto.

12.6. Al « La Varenne », turisma kaj folkloro ŝkeĉo de Jacques Mahé.

19.6. Hirno de Jules Romains (trad. H. Boucon) kaj « Ĉagrenegoj », de Courteline.

26.6. « Naskiĝo de Esperanto », radio-scenoj.

## LA ESPERANTO-ELSENDOJ EL 3 SR, AŬSTRALIO.

Laŭ informoj de s-ro Allan Turner, la elsendoj pri Esperanto el la radio-stacio 3 SR (ondlongo 238 m.) okazas nun laŭ jena programo : la unuan merkredon monate je 11.15-11.30 ; la trian vendredon monate je 22.45-23.00 ; kaj la trian dimanĉon monate je 20.45-21.00.

## NI FUNEBRAS

— S-ro ANTONIN KUDELA. — Dum la epoko de mensogo, tempo kaj pertorto forlasis nin por ĉiam la entuziasma batalanto Antonin Kudela, la fondinto kaj multjara prezidanto de la esperantista societo en Olomouc. Li estis inter la unuaj apostoloj, kiuj komencis disvastigadi nian movadon en Moravio, tuj kiam la pioniroj Ĉejka kaj Krumpholz komencis tie semi la Zamenhofajn ideojn. Tiam (en 1908) lernis Kudela nian lingvon en Roznov pod Radhoŝtem kaj tuj, uzante sian organizan talenton, eklaboris propagandante ĝin. Grandajn sukcesojn li havis en Olomouc, kien li estis translokita kiel juĝa oficiŝto. Li fondis Esperanto-societon, en kiu ĉeĥoj kaj germanoj harmonie laboris en rondo familia. Nelacigeble li instruis la lingvon en sennombraj kursoj, fortigante tiel la societon, kiu havis tiam pli ol cent pagantajn membrojn.

Post multjara gvidado de la societo li rezignis pri la prezidanteco, transloĝiĝinte el Olomouc, sed malgraŭ tio li ne ĉesis daŭrigi siajn laborojn, ĝis la senindulga morto forrabis lin el nia familia rondo. Li atingis aĝon de 68 jaroj.

— S-ro JOHANNES WALDEMAR KARSCH, registara inspektoro en Dresden (Germanujo), konata germana samideano, esperantisto de 1908, dum multaj jaroj vicprezidanto de UEA (ĝis 1934), mortis la 14.4., je la mortotago de D-ro Zamenhof mem, en Weixdorf b. Dresden, 57-jara. — Honoron al lia memoro, kaj koran kunsenton kun liaj edzino kaj parencoj!

— S-ro SAMUEL C. EBY, subtenanta membro de IEL, mortis la 26.2. en sia hejmo en New York, Usono. Li havis 83 jarojn, estis fervora esperantisto dum multaj jaroj kaj ĉeestis la universalsajn kongresojn en Varsovio kaj Londono. Ni kondolencas kun lia edzino, ankaŭ esperantistino.

# Jura fako

Redaktata de D-ro Leopold Dreher,  
advokato en Kraków, Polujo.

En la aprila numero de « Esp. Internacia », kiel sek. de Internacia Societo de l' Esperantistaj Juristoj, mi antaŭanoncis publikigadon de jurista terminaro esperanto-esperanta. Sed prave skribis i. a. kolego Rebiček el Olomouc (Ĉeĥoslovakio) pri tiu projekto : « ... prefere oni traduku fakajn verkojn kaj nur poste kompilu el ili la fakajn esprimojn ». Same opinias nia konata s-ano Stettler, cetere ankaŭ nia majstro mem havis tute analogan opinion pri kreado de vortaroj.

Sekve, en 1939 eble sufiĉos aperigi en E. I. iom da tekstoj, kiuj konsistigu bazon por priterminara diskutado. Intence mi ne donos klarigojn al unuopaj esprimoj, ili devus fariĝi klaraj per la teksto mem, almenaŭ por fakuloj-juristoj. Cetere, kaŭzas tion ankaŭ manko de loko en gazeto. Sed tiom pli volonte mi atendas ĉies kritikojn.

Jen komenco de la teksto de « Kodo pri Obligacioj » nun validanta en Polujo (en tuta Polujo, ne nur en Kraków, sed ankaŭ en Warszawa, Poznan kaj Wilno, kie antaŭ la milito validis la kodoj aŭstria, germana, rusa kaj franca de Napoleono).

## Fontoj, esenco kaj specoj de obligacioj.

Art. 1. Obligacioj naskiĝas el vol-deklaroj samkiel el agoj kaj aliaj okazajoj, kiuj laŭ la leĝo naskas obligacion.

Art. 2. La esenco de obligacio konsistas en tio, ke la debitoro devas presti al la kreditoro.

La esenco de presto povas esti dono, ago, malago, ĉesigo aŭ tolero.

## Obligacioj divideblaj kaj nedivideblaj.

Art. 3. Se estis kelkaj debitoroj aŭ kreditoroj, kaj la presto estas dividebla, la debitaĵo samkiel la kreditaĵo dividiĝas je tiom da egalaj partoj sendependaj unu de alia, kiom estas la nombro de la debitoroj aŭ kreditoroj.

La presto estas dividebla, se ĝi estas plenumbla parte, sen ŝanĝi siajn esencojn kaj valoron.

Art. 4. Kundefitoroj, kiuj devas plenumi preston nedivideblan, respondecas por la plenumo de la obligacio tiel kiel debitoroj solidaraj.

Art. 5. Se estas kelkaj kreditoroj, ĉiu el ili povas postuli plenumon de obligacio nedividebla.

Okaze de kontraŭdiro de eĉ unu el la kreditoroj, la debitoro devas presti al ĉiuj kreditoroj kune, aŭ deponi la prestaĵon en juĝejo.

Art. 6. Neniu el la kreditoroj, rajtigitaj al presto nedividebla, povas, sen konsento de la kunkreditoroj, liberigi la debitoron el la debit-

ajo, nek ŝanĝi la originan obligacion aŭ akcepti alian preston.

Prokrasto de la debitoro samkiel interrompo aŭ haĵo de preskriptiĝo rilate al unu el la kreditoroj, rajtigitaj al presto nedividebla, estas efika rilate al ĉiuj kreditoroj.

Art. 7. La debitoro, kiu plenumis obligacion nedivideblan, povas postuli de la kundefitoroj, ke ili redonu al li la valoron de la prestaĵo en tiaj partoj kiaj konformas al ĉiu el ili.

La kreditoro, kiu ricevis preston nedivideblan, respondecas rilate al la kunkreditoroj en tiaj partoj, kiaj konformas al ili.

Estas jure supozate, ke la partoj estas egalaj.

★

Por ke ankaŭ nejuristoj komprenu la misteran signifon de supraj juraj reguloj de la kodo, mi volas nur doni unu ekzemplon :

Se la prest-objekto (prestaĵo) konsistas el mono, ĝi estas ĉiam nepre dividebla, ĉar oni povas monon dividi sen ŝanĝi ĝian esencojn kaj ĝian valoron. Sed nedividebla estas la prest-objekto, se ĝi konsistas el fortepiano aŭ alia objekto, kiu dividiĝas nepre perdis sian valoron. Tute klara tio fariĝas ekzemple, se temas pri livero de bovo : se du aŭ pli da personoj prenis sin la devon liveri bovon al unu persono, ni havas la aferon pri plureco de debitoroj kaj nedividebleco de la prestaĵo, sed se unu persono surpris pagi 1000 frankojn al du aŭ pli da personoj, la afero estas pri dividebleco de la prestaĵo sed plureco de kreditoroj.

## Ĉu « Esperanto nedezirata » ?

La aviadistoj urĝe bezonas internacian lingvon.

Lastatempe, la tutmonda gazetaro multe interesiĝis pri la kuraĝa entrepreno de la sovetia aviadisto Kokkinaki, kiu provis transflugi senhalte la distancon Moskvo-Novjorko. Malgraŭ la deviga interrompo, tiu flugo, pro la atingita rapideco, signifas treege gravan paŝon al la estonta regula flugo-vojo Moskvo-Novjorko « en unu tago ». Ĉiuj ĵurnaloj, raportante pri la deviga alteriĝo de la bravaj flugistoj, substrekis, ke oni neniel sukcesis interkompreniĝi kun ili, nek ekscii pri la kialoj de la katastrofo, ĉar la du flugistoj ne parolas la anglan lingvon, kaj la kanadanoj ne komprenas la rusan.

H. G.

## Margarete Saxl ricevis indan ripozejon



Tiuj, kiuj ĉeestis la Kongreson en Londono, kiam n'a amata amikino, Margarete Saxl, tiel neatendite forpasis, memoros ke oni faris monkoklekton por pagi la koston de la enterigo kaj por ebligi la starigon de konvena memoriga ŝtono super ŝia tombo en Hendon Park Cemetery, Mill Hill, Londono. Ĉi tiu monumento estas nun en sia loko kaj ĉi-supre estas fotografiaĵoj de ĝi. Por la informo de tiuj, kiuj deziras viziti ĝin, la numero de la tombo estas 46310.E11.

Sur la monumento troviĝas, sub ŝia nomo kaj mortotago, la vortoj :

« Talento mirinda, ĝojplena koro :  
Kun amo ŝi restos en ĉies memoro. »

I.E.L. estas ricevinta nun preskaŭ precize la sumon necesan pro la enterigo kaj pro la monumento. Dum la Paskaj Kunsidoj de la Estraro, oni decidis daŭrigi la kolekton por havigi sumon sufiĉe grandan por pagi la koston de prizorgo kaj purigado de la tombo kaj de la plantoj sur ĝi ĉiame. La kosto por tio estas £69, kaj ni estas certaj ke multaj el la geamikoj ĉiulandaj de Margarete Saxl volonte sendos tiucele tiom, kiom ili povos, por ebligi la plenumon de tiu plano. Oni povas sendi donacojn al niaj Ĉefdeligitaj kaj Perantoj aŭ rekte al la Centra Oficejo de Internacia Esperanto-Ligo, Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo.

# TRA LA MONDO

## Promenado

« Se vi volas pacon, preparu vin por milito ! »

Al tiu ĉi sentenco, starigita de la antikvaj Romanoj, « dankas » la mondo multan malbonon, multan maltrankvilon, kaj multajn suferojn.

Ekzistas momentoj, kiam la dirita sentenco povas esti prava. Tio okazas, kiam, laŭ alia sentenco, « la plejbonulo ne povas vivi pace, se tio ne plaĉas al najbaro malbonvola ».

Sed ĝenerale estas ja absurda la ideo savi pacon per preparo de milito. Ekscesigita militpreparo nepre iam kondukas al milito.

Se oni aŭskultas la paroladojn de la gravaj kondukantoj de ŝtatoj, oni povas konvinkigi, ke ili ĉiuj nur volas la pacon. Ĉiu havas nur la plej honestajn intencojn, ĉiu abomenas la militon, ĉiu preparas sin kaj sian popolon por la milito nur tial, ke ankaŭ la aliaj kaj ties popoloj tion saman faras.

« Francujo ne konas malamon », diris Daladier, « ĝi sincere simpatias al ĉiuj popoloj. Ĝi scias el longa sperto, ke milito ne solvas iun ajn el la aktualaj problemoj, ke milito, kontraŭe, faras ilin pli malfacilaj kaj pli fatalaj. Francujo opinias, ke en mondo, kies naturaj riĉaĵoj estas dekobligitaj per la inventoj de la scienco, ĉiu popolo povus ĝui sian parton de feliĉo kaj libereco. »

Mussolini deklaris, ke en la nuna momento ne ekzistas en Eŭropo tiaj problemoj kiuj ne povus esti solvataj per pacaj metodoj. Simile deklaris la germana kanceliero.

Pri la sincera pacvoĉo de l' brita ĉefministro apenaŭ ekzistas dubo.

La prezidanto de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Norda Ameriko pli ol unu fojon prenis iniciatojn por la paco.

Kaj tamen ĉie, ĉie daŭras, pliampleksiĝas, plirapidiĝas la armadoj. Estas, kvazaŭ

iu diablo obsedus la popolojn. Iu abomeninda monstro el Inĝero.

Ke ĝi baldaŭ reŝforiĝu tien, el kie ĝi elrampis. Ke denove la homaro vivu en tiu relative bona interkonsento, en kiu ĝi dum preskaŭ duonjarcento vivadis, antaŭ ol eksplodis tiuj malfeliĉaj pafoj de Sarajevo...

### Ni fieraj eŭropanoj.

Multaj eŭropanoj estas tre fieraj pri la grandeco, la kulturo, la klereco de sia kontinento kaj de sia respektiva lando en tiu kontinento. Sed kiel estas envere ?

Eŭropo havas areon de 10 milionoj da kvadrataj kilometroj (en ĝi — por nomi du landojn — Italujo havas iom pli ol 300.000, Nederlando eĉ nur ĉ. 35.000) ; sed Azio mezuras pli ol 44 milionojn da kv. km. La dek plej longaj riveroj en Eŭropo estas la Volgo (3895 km.), Danubo (2900), Dnjepro (2265), Dono, Peĉaro, Dvino, Dnjestro, Rejno (1320), Elbo kaj Vistulo ; sed la Nilo-Kagero en Afriko mezuras 6400 km., Misisipi-M'surio en Nordameriko 6300, Amazono en Sudameriko 5300 km. La plej altaj montoj de Eŭropo estas Monto Blanka (4840 m.) kaj Monto Rosa (4638), la konata Grossglockner (Germ. Aŭstrio) altas nur 3798 m. ; sed en Azio ekzistas la Ĉomolungmo (Everesto) kun 8882 m., en Sudameriko la Akonkagvo kun 7010 m., en Afriko la Kilimanĝaro kun 6010 m. La plej granda lago eŭropa, la Ladoga, ampleksas 18.180 kv. km. : la Supra Lago en Nordameriko 81.000, la Viktoria-lago en Afriko 68.800, la Aral-lago en Azio 64.500.

Eŭropo eĉ ne povas plu fieri pri la plej granda urbo : Grand-Londono havas pli ol ok milionojn da enloĝantoj, sed Grand-Novjorko jam superis ĝin. Post Novjorko kaj Londono, la tria urbo en la mondo fariĝis Tokio ; poste venas Grand-Parizo, Berlino, kaj tiam Ĉikago.

Eĉ pri grandaj sciencistoj kaj artistoj Eŭropo ne ĝuas plu monopolon, de kiam en

la lastaj jardekoj tiel multaj el la plej kapablaj eŭropanoj rifuĝis en landojn trans-oceanajn. En unu « scienco » kaj « arto » Eŭropo ankoraŭ dominas : milito kaj preparo por ĝi ; sed eĉ en tiu sfero nemulte jam postrestis unu popolo en Ekstrema Oriento...

### Japanismo.

S-ro Naoka raportas :

Barono Hiranuma, ĉefministro, ĉe la unua kabineta kunsido tostis per sakeo, japana propra alkoholaĵo, forĵetante la ĝisnunan kutimon de ĉiuj kabinetoj uzi ĉampanon en tia okazo.

Nova princino de la geimperiestroj estas nomita laŭ la teksto de Man'yoosyuu, japana klasika poemaro, kio estas sensacia rompo de longjara tradicio elekti nomon de imperiestraj familianoj laŭ ĉinaj klasikaĵoj.

La basbala teamo de la mezgrada lernejo « Tyuukyoo Syoogyoo » anstataŭigis la latinlitere skribitan lernejan nomon sur la uniformo per « japanaj literoj », sed ili estas — ĉinaj ideogramoj.

### Strangaj inventoj.

En ĉi tiuj malsekuraj tempoj obliĝas la nombro de tiuj, kiuj fakte aŭ laŭdire faras inventojn servontaj por pliefikigi la militon, aŭ por kontraŭlukti ĝan efikon. Estas homoj kiuj volas elektrigi la aeron super la urboj, por ke aeroplanoj atakontaj estu trafataj de elektraj fulmoj. Iu inventis (li asertas) kontraŭaviadilan kanonon kiu aŭtomate direktiĝas en la direkto de la susurado kiun faras la aviadiloj ; kiam oni demandas detalojn pri lia projekto, li volas ĝin malkaŝi nur, antaŭe ricevinte grandan monsumon. Alia asertas ke li inventis preparaĵon kiu faras objektojn nevideblaj. Plej ofte tiuj « inventistoj » konsideras siajn ideojn tute seriozaj ; sed ĉe la plej multaj ekzistas nur tiu ideo, sen io cetera, kaj ĉe aliaj temas simple pri frenezajo.

### Malliberejo forigota — pro nesufiĉa nombro da « enloĝantoj ».

Dum ke en kelkaj landoj oni devas konstante plimultigi aŭ pligrandigi malliberejojn, kaj eĉ aranĝi grandajn barakarojn por havi sufiĉe da loko por ĉiuj netaŭguloj

kaj suspektinduloj, Svedujo estas la feliĉa lando, kie la malliberejoj ne havas plu sufiĉe da enloĝantoj. La prezidanto de la kasacia tribunalo en Stokholmo, Schlyter, deklaris, ke post diversaj reformoj de la punjuro la nombro da malliberuloj malkreskis tiom, ke supozeble oni forrompos la plej grandan malliberejon de la lando, la tiel nomitan « Langholmen » en Stokholmo, sen konstrui novan.

### Nia afero.

Pentekosto estas la festo preferata de la esperantistaro por aranĝi siajn ĉiujarajn landajn kongresojn kaj ĉefkunvenojn. Ankaŭ en la nuna jaro ree kunvenis centoj da fervoruloj en la diversaj kongresurboj por manifesti pri nia afero, por paroli en nia lingvo, por komune kanti la esperigan himnon kiu finiĝas per la vortoj :

Nia diligenta kolegaro

En laboro paca ne laciĝos,

Ĝis la bela sonĝo de l' homaro

Por eterna ben' efektiviĝos !

Tiel ni kantis en la pasintaj jardekoj, tiel ni kantos en la estonteco, kaj konforme al tiu kanto ni agos kaj laboros, tute egale, ĉu la cirkonstancoj estos jes aŭ ne favoraj. La estonteco estas nia. *Zigzago.*


## Penso por la monato

*Estas kvazaŭ multaj vojoj al la pinto de la monto — la Vero. Unuj suprenflugas per flugiloj de la fido ; unuj supreniras per helpo, kiel sur kabla fervojo ; aliaj supreniras iom post iom, farante ŝoseon dum ili iras, por ke aliaj sekvu! Ĉi tiuj estas la sciencistoj. En la fino, sendube, ĉiuj atingos la pinton, aŭ tion kio ŝajnas la pinto. Nuntempe ĉiu eble opinias, ke la alia estas malprava; ĉiu eble kredas, ke lia vojo estas la sola, sed tiuj diferencoj kaj diverĝoj ĉesos, kiam ni trovos, ke de la komenco ni celis la saman rezulton, — ke la Vero estas unu; kaj ni verŝajne renkontiĝos ĉe la pinto kaj premos la manon unu de alia.*

SIR OLIVER LODGE.

# LA EKSPOZICIO DE L'AKVO LIEĜO 1939

INTERNACIA EKSPOZICIO KIU UZAS ESPERANTON.



Belgujo festas en la nuna jaro la pretigon de la Albert-Kanalo, kiu ligas la Antverpenan havenon al la Lieĝa industria regiono. La Albert-Kanalo estas unu el la plej vastaj entreprenoj kiujn la homa genio realigis en la kuranta jarcento. Ĝia realigado, kiun oni povas kompari kun tiu de la Panama Kanalo, kostis dek jarojn, kaj du miliardojn da belgaj frankoj. Tiu ĉi akvo-vojo, kiu trapasas pitoreskajn regionojn, havos konsiderindajn resaltojn en la ekonomia vivo de Belgujo. Ĝi permesos la valorigon de la karbominejoj en la « Kampino », la industriigon de la flandraj kamparoj, ĝi vekos la valonajn industriojn kaj faros el Lieĝo unu el la ĉefaj internaj havenoj eŭropaj.

La Internacia Ekspozicio de Lieĝo estas la granda « evento » eŭropa de 1939. Ĝi trovis kadron ravan kaj vere unikan sur grandegaj terenoj ambaŭborde de la Mozo, ĉe la kuniĝo mem de la rivero kun la Albert-Kanalo.

La Ekspozicio montras sub altira kaj varia formo la rolon de la akvo en la scienco kaj en la arto de l' inĝeniero, en la

industrio, en la kolonioj, en la higieno, en la komforto, en la dekorado, en la turismo, en la sportoj, modoj, ktp. La navigado kaj la fiŝkaptado trovis lokon tute specialan. Tiu tuto, grupiganta ĉiujn homajn konojn rilate al la flua elemento, estas kompletigita per serio da pitoreskaj kaj spektaklaj instalaĵoj, kiel : La Gaja Moza Vilaĝo, la Naĝbasenego, la « Lakustra Aglomero », la Zoologio de la akvaj estaĵoj, Atrakcio-parko, « Teleferiko » kaj Giganta Akvo-fontano. Aliflanke, internacia Belarta Salono kaj sekcio de nuntempa arto unuigas la majstroverkojn dediĉitajn al la akvo, de ĉiuj skoloj kaj epokoj. Feaĵo je la gloro de l' akvo, — jen la altira temo de Lieĝo 1939.

La fluida elemento ligas siajn sorĉojn kun tiuj de la lumo, por krei ĝis nun neviditajn dekormotivojn, kiuj al la Mondfoiro donas konstantan atmosferon apoteozan. Interalie estu citataj : la akvo-damtabulo la akvo-tunelo, la kaskadoj lumigitaj, la akvo-ĝardenoj, kaj fine la giganta ŝprucfontano, kiu altiĝas ĝis 100 metroj el la mezo de la Mozo kaj kiu estas la plej

## Romo sin preparas...

Romo sin preparas por grandaj okazontaĵoj. Unuflanke tio estas la Universala Ekspozicio en 1942, kaj aliflanke tio estas la Olimpiaj Ludoj, kiuj en 1944 lokhavu en tiu ĉi fama ĉefurbo antikva kaj samtempe moderna.

Por la Universala Ekspozicio oni projektas, interalie, novan elektran fervojon kiu kunligos Romon kun la ekspozicia tereno. La nova fervojo, konstruota kun karakterizaĵoj de granda trafiko, kapablos transporti 25,000 vojaĝantojn ĉiuhore en ambaŭ direktoj kaj, post taŭgaj laboroj de adaptado, de la fervojo Romo-Lido, oni esperas atingi transport-kapablon de 46,000 vojaĝantoj ĉiuhore en ambaŭ direktoj. La longo de la linio, kiu komenciĝas ĉe la Stacidomo ĉe Placo Termini, estas 11 1/2 kilometroj. La antaŭkalkulo de la elspezo por la sola konstruado estas 90 milionoj da lroj, sumo al kiu oni devos

grandioza realigo tiuspeca ekzistanta en la mondo.

La Gaja Moza Vilaĝo estas sintezo de folkloro kuriozo kaj valonaj metioj. Ĝi posedas siajn preĝejon, sonorilaron, komunan domon, publikajn placojn, modelfarmon, riveron, metiistajn magazenojn, kafejojn, restoraciojn, dancejojn kaj variajn komercejojn. Ĝi estas plie animata, de mateno ĝis vespero, per koncertoj, vilaĝaj festoj, baloj, folkloraj tagoj, popolsportaj konkursoj ktp.

Granda Internacia Sezono koincidas kun la Ekspozicio. Ĝia kompleta programo pleniĝus tutan libron. Estu menciataj : la Ludo de Lieĝo, la akva kaj luma procesio, la flagprocesio kiu grupigos pli ol 3000 emblemojn de belgaj societoj, la festo de la kavalerio, la ŝipafesto ktp.

Eble ni havos en iu venonta numero la lokon por raportoj pri detaloj. Sed cetere ĉiuj informoj pri la Akvo-Ekspozicio estas haveblaj, en Esperanto mem, de la jena adreso : Internacia Ekspozicio de Lieĝo 1939, Informoj en Esperanto, Dieststraat 184, Leuven (Louvain), Belgujo.

aldoni la elspezon por la konstruado de la diversaj interaj stacidomoj.

Por la Olimpiaj Ludoj, funde de la valo de la Farnesina, apogita al la flankoj de Monto Mario, estas konstruata la Olimpia Stadiono, kiu kompletigos la grandajn konstruaĵojn de la Urbo de l'Junularo ĉe Forumo Mussolini.

Oni ne povus trovi pli taŭgan lokon por la konstruado de tiu stadiono, en kiu okazos ĉiuspecaj sportaj bataloj. La verda areno por la « team »-ludoj kaj por la konkursoj gimnastikaj kaj rajdaj estas jam preta. La eksteraj laboroj havas aspekton aparte imponan, pro la plivastigado kaj konstruado de novaj loĝioj. Nuntempe la stadiono povas enteni 10,000 personojn ; sed poste ĝi povos enteni 100,000. Fakte, ĉirkaŭ la sep blankaj ŝtupegoj el travertino antaŭe konstruitaj estas aldonataj aliaj 21 ŝtupegoj. Detale pristudita kaj bone solvita estas la problemo pri la pasejoj de ekstere internen kaj inverse, por ebligi la plej rapidan fluadon de la amasa ĉeestantaro. Tiel la 100,000 rigardantoj povos atingi siajn lokojn en la interno tute facile, kaj same simple estos la alfluo de la amasoj al la centro de la ponto « Duko de Aosta » nun konstruata, kaj de la larĝa aleo Angèlico. Ĉe la maldekstra flanko de la Olimpia Stadiono, preskaŭ ĝis la komenco de l'nuna vojo, kiu supreniras al Monte Mario, estos starigata la honorloĝio, ĉe kies flankoj estos konstruataj aliaj du loĝioj. Sekve, la sumo de la ŝtupegoj maldekstre de la Stadiono estos 40. Ankaŭ ĉe la centro de la loĝio oni konstruos grandan scenejon por la popolaj spektakloj. Por ĉi tiu granda verko nuntempe laboras alterne pli ol 700 laboristoj.

Universala Ekspozicio kaj Olimpiaj Ludoj, — du vere grandaj okazontaĵoj. Necesas ja, esti preta ĝustatempe. Romo sin preparas ...

S. B.





IMPRESOJ ORIENTAJ :

## Karavano pasas...

Kvazaŭ arĝenta disko la plena luno faras sian kvietan rondiron en la ĉiela volbo. La suproj de la arboj en la arbarego kvazaŭ naĝas en arĝenta lumo. La riveretoj, rulfalantaj laŭlonge de la deklivoj de l' montaro, jen similas hidrargan spegulon. jen ĉe iu kurbiĝo malaperas en mallumon, por subite reapari ie neatendite — banante sin en la ĉien penetranta lumo de la ridanta luno. En la pala lumo ĉio aliformiĝas — iĝas groteska. Iu fantazia konstruaĵo frapas la okulojn; sed ju pli vi alproksimiĝas, des pli ĝi ŝanĝiĝas, — poste ĝi estas nur arbusto. Cervo trinkanta ĉe riverbordo ŝajnas ŝvebi en arĝenta nebulo. Ĝiaj kruroj kunfandiĝas en la malcerta krepusko. Ĉio silentas.

Subita grumblado de iu rabobesto montratas al vi ke vi ne estas sola — ke sub la ŝajna kvieto sin kaŝas insidaj atakoj — kaj kria tumulto inter la simioj, kiuj nerve saltas inter la branĉoj, pruvas ke la tribo pagis sian tributon.

Baldaŭ la sereno revenas. La folioj de l' arboj eĉ ne plu tremetas. La pejzaĝo kuŝas kvazaŭ en magia sorĉo, kaj ni iĝas revemaj. Ni eĉ ne mirus, se nun aperus nimfoj en diafanaj vestoj dancante ronde sur senarba loko en la arbaro — aŭ ke bando de koboldoj kun flutoj venus al ni renkonte.

Sed kio aperas tie sur tiu montoselo?

Silente, kiel fantomoj en funebra procesio, alproksimiĝas longa vico da rajdantoj kaj piedirantoj. Neniu bruoj aŭdiĝas. Kiel sekvantoj de enteriga procesio homoj kaj ĉevaloj treniĝas en la fantoma lumo. La ĉevaloj, ambaŭflanke ŝarĝitaj, ŝajnas monstraj ventruoj. En la procesio troviĝas viroj kaj virinoj portantaj ŝarĝojn sur la kapoj. En nia ekscitita fantazio ĉio aliformiĝas en bibliajn vizion. Inter la vicoj brilas lancoj. Tiel la tribo de Moseo estis marŝanta dum sia migrado al la promesita tero.

Tie, kie fine la d'kl'voj transiĝas en la ebenaĵon, la karavano haltas. Lignaroj ekflamas, kaj en la ruĝa lumo ĉio klare dis-

tingiĝas. La fantaziaj pakajoj estas nur korboj kaj en la korboj estas nur legomoj kaj fruktoj ĉiuspecaj. La lancoj, kiujn ni konjektis esti portataj por ŝirmi la irantojn, estas nur simplaj portadbastonoj. Antaŭ ni troviĝas aro da homoj, terkulturistoj el la montaro, survoje al la granda vendejo en la urbo por tie vendi siajn produktojn.

Jam dum kvin horoj ili marŝadis kaj ankoraŭ tri ili bezonas por atingi la urbon. Nun ili iom kampas, ĉar la krutaj vojoj estis lacigaj kaj la celo ankoraŭ malproksima. Kaj la akra vento, kiu lev'iĝas kiam la nokto finiĝas kaj nova tago ekleviĝas, penetras ĝis la ostoj.

Kafo baldaŭ estas pretigata, kvanto da maizo rostata, kaj ĉiuj manĝas kaj trinkas antaŭ ol ekiri la lastan marŝadon al la urbo, kies ventro englutas ĉion manĝeblan.

La urbo ne longtempe vivados per la nutraĵoj alportitaj de nia karavano. Sed por niaj karavanoj la urbo estas la alloga paradizo, de kies riĉeco almenaŭ gutu iom sur ilin. Laboregaj senhavuloj, kiuj petas de la vivo nur la plej necesan porvivon, ili faras tiun pilgrimadon por ŝanĝi siajn produktojn je mono, kiun ili bezonas por havigi al si ilaron aŭ, en plej favoraj cirkonstancoj, kelkajn kaprojn kiuj donos idaron kaj lakton. Kaj kiam « toean Allah » (Dio) estos plej favora, ili eble povos aĉeti junan bovon, kiu poste povos transpreni la taskon treni la plugilon tra la sulkoj. Sed tio estas revo kies efektivigon vidas nur unu el dekmil.

La komercaĵoj ne donas multon. Ruzaj ĉinoj kaj suspektaj araboj trompas ilin pri la valoro kaj el la aspiroj ne multe efektivigis. La plej energiaj ne fidis la komercistojn sur la vendejo kaj provas vendi siajn produktojn en la urbo mem.

Ankaŭ tie, k'a seniluziigo! La « struggle for life » (vivbatalo) renkontigas ilin kun multaj aliaj mizeruloj, kiaj ili, kiuj ankaŭ serĉas sian porvivon. Kaj ankoraŭ tutan tagon, post la longa nokta marŝado, ili vagas tra la urbo, penante vendi siajn

# La sep mondmirakloj

Pli ĝuste oni parolus pri la sep mondmirindaĵoj. Kiu konas ilin? Certe ĉiu jam aŭdis pri ili; sed nur malmultaj homoj scias precize kiuj kaj kio ili estis. Oni povos fari provon, kaj oni trovos konfirmita, ke eĉ homoj, kiuj kredas posedi universalan klarecon, ne estas kapablaj citi ĉiujn, ne parolante pri tio ke ili scias preskaŭ neniajn detalojn. Senkulpage por tiuj homoj oni povas konsideri, ke hodiaŭ jam nur unu el la sep mondmirindaĵoj restas konservita en sia origina formo; rilate al la ceteraj restis nur la memoro.

La sola mondmirindaĵo, kiun ni eĉ nun povas rigardi nur kun admiro kaj mirego, estas la **Piramido de Keopso** apud Gize en Egiptujo, la plej miriga kaj plej mistera el la piramidoj. Neniu alia konstruaĵo en la mondo estis objekto de tiom da esploroj, konjektoj kaj klarigoj. Libro estis skribitaj pri ĝi, sciencaj disputoj estiĝis pro ĝi, sed ĝi restas ĝis nun same impresa al la individuo kiel antaŭ 2,400 jaroj, kiam la greka historiisto Herodoto emociite staris antaŭ ĝi. Estas malfacile fari al si ĝustan imagon pri la grandegaj mezuroj de la Keops-piramido. Ĉiu el la

---

fruktojn kaj legomojn. Sed ju pli la tago progresas, des pli la fruktoj malboniĝas, ĝis fine ili ne plu estas vendeblaj. Tia estas la sorto de miloj da malgrandaj terkulturistoj loĝantaj en la montaro. Kaj tiel restos.

Ĉar en la indiĝena socio logika organizado mankas. Ĉiu kulturas laŭkaprice kaj laŭ metodoj kiuj jam estis uzataj en la pra-tempo. Kvankam la registaro pere de siaj kulturkonsilistoj klopodas plibonigi la kulturmetodon kaj la produkton, la rezultoj estas ankoraŭ plorindaj.

Kaj kiam la eŭropano, komforte sidanta ĉe la manĝotablo, senpripense senŝeligas frukton, pri kiu la mastrino diras ke ŝi ĵus aĉetis ĝin je malkara prezo, li tute ne konscias ke tiu frukto vagis nokte tra la montaro, pakita en korbo, kiun la tutan nokton portis iu viro aŭ virino sur la kapo.

J. H. A. Sens.

kvar lateroj estas 232 metrojn longa. La alteco estas 148 metroj. Oni kalkulis ke minimume ducent milionoj da kilogramoj da ŝtonoj estis necesas por la konstruado de tiu giganta monumentego. Tiuj ĉi ŝtonamasoj estis alportitaj el montoj situantaj oriente de la riverego Nilo. Herodoto certigas ke minimume 10,000 homoj laboradis dum dudek jaroj por transporti la ŝtonojn kaj konstrui la monumenton.

Dua mondmirindaĵo estis la **Pendantaj Ĝardenoj de Semiramiso**, fondintino kaj reĝino de Babilono. La ĝardenoj estis konstruitaj en la ebenaĵo de la rivero Eŭfrato, antaŭ 2,500 jaroj. Havante longecon de 125 metroj kaj la saman larĝecon, ili alteniĝis terasforme, kvazaŭ grandega, floranta ŝtuparo, al la muroj de la urbo. Ili estis portataj de artefaritaj kolonoj, kies plej malaltaj havis altecon de 25 metroj, kaj la plej altaj tian de 100 metroj.

Tria mondmirindaĵo, la **Templo de Artemise** (greka diino de l'ĉasado) en Efezo, estis modela ekzemplo de greka konstruado kaj estis konstruita dum la sesa jarcento antaŭ Kristo.

La **Statuo de Zeŭso** de la fama greka skulptisto Fidiaso, kiu estis konstruita en templo de la malgranda urbo Olimpio, same akiris la gloron aparteni al la sep mondmirindaĵoj. Tiu ĉi statuo estis konstruita dum la tielnomita « ora epoko » de Grekujo, laŭ ordono de Perikleo.

La **Tomba Monumento de Maŭzolo**, persa reĝo, laŭ kiu ĝi ricevis la nomon « Maŭzoleo », estis konstruita en la urbo Halikarnaso. Reĝo Maŭzolo tre ŝatis la arton. Intage li kunvenigis ĉe sia kortego multajn artistojn kaj instruitulojn kaj esprimis la deziron konstruigi por si kaj sia edzino Artemisio tomban monumenton, kiu akiru la saman gloron kiel la egiptaj piramidoj. La reĝo komisiis la plej eminentajn arkitektojn el Grekujo por realigi la planojn. Tamen antaŭ ol la monumento estis finkonstruita, la reĝo mortis en la jaro 352 a. K.; sed lia edzino Artemisio iniciatis la finkonstruadon laŭ la aluditaj planoj. Tiu ĉi maŭzoleo

estis parte rompita de anoj de la Johana Ordeno, kiuj en milito kontraŭ Sultano Solimano II-a bezonis konstrumaterialon por fortikaĵoj. Pli poste oni trovis okaze de elterigo subteran halon kun multaj kolonoj kaj bele pentritaj muroj. En apuda ejo oni trovis marmoran sarkofagon, sur kiu kuŝis kasko. La malfermon de la sarkofago oni prokrastis ĝis la sekvinta tago; sed dum la nokto enpenetris rabistoj kaj forŝtelis ĉiujn objektojn.

La **Koloso de Rodo** (Rhodos) estis statuoj, kiu prezentis la sundion, kiun oni adoris antaŭ ĉio sur la insulo Rodo. La urbo Rhodos estis ornamita per multaj statuoj kaj monumentoj. La « koloso » estis konstruita de la skulptisto Hares kaj leviĝis super la enirejo al la haveno. La el-kaj enveturantaj ŝipoj traveturis inter la gamboj de la statuoj. Ĝi estis alta 45 metrojn. Por la muldado el bronzo oni bezonis 12 jarojn. Sed bedaŭrinde ĝi staris nur ĉ. 56 jarojn, renversigis okaze de tertremo kaj disrompiĝis je multaj pecoj. Plej bone oni povas fari al si imagon pri la grandeco de la statuoj, se oni aŭdas ke la polekson de tiu ĉi statuoj oni ne povis ĉirkaŭi per ambaŭ brakoj. Kiam la araboj venk-akiris la insulon, ili tute despecigis la statuojn kaj vendis ĝin al negocisto. Por fortransporti la ruinaĵojn, la negocisto bezonis 900 kamelojn.

Sur la insulo Faro (Pharos) troviĝis la sepa mondmirindaĵo, la **Lumturo de Faro**. Tiun ĉi faman lumturon, Ptolemeo (konata astronomo kaj matematikisto en Aleksandrio) konstruigis de la greka arkitekto Sosastro. Laŭdire la fundamento de la turo konsistis el masivaj vitraj blokoj, ĉar oni opiniis ke tiu ĉi materialo estas la plej malceda kontraŭ la efikoj de la marakvo. La turo estis alta 242 metrojn. La konstruaĵo enhavis 300 grandajn ĉambrojn kaj loĝiĝis tutan garnizonon. Plej supre brulis fajrego, kiun la maristoj povis vidi jam de malproksime. Ankoraŭ en la 11-a jarcento oni subtenadis la fajron. En la jaro 1375 la lumturo renversigis pro terura tertremo.

Per tio estis detruita la lasta el la mondmirindaĵoj de la Antikva Epoko, kaj restis kiel sola escepto la Keopsa Pira-

mido kiu konserviĝis en sia plena impona grandeco ĝis la hodiaŭa tago.

Venis nova epoko ne malpli grandioza ol la antikva, kaj ĝi konstruigis al si ankaŭ novajn mondmirindaĵojn. La turon de Faro superbrilas hodiaŭ la famo de l'Turo Eiffel, aŭ de l'Empire-Domego; la Koloson de Rodo anstataŭis la Statuoj de Libereco en la haveno de Novjorko; kaj kiu elnombros la gigantajn pontojn, elektrofaraĵojn, ŝipegojn, la planetariojn, stadionojn, la katedralojn, universitatojn, magazenojn, fabrikojn kaj la mil mirindaĵojn de l'moderna scienco kaj tekniko?!

H. W.

## La ridanta stelisto

Apud Melburno, en Aŭstralio, troviĝas marborda urbeto Seaford. Inter la « Ti »-arboj, malproksime de la vojo, kuŝas la semafina dometo de sinjoro F. Ĉi tiu dometo ofte suferas pro ŝtelteniro; kaj kiam, iumatene, najbaro rimarkis ke la dometa fenestro estas rompita, li metis la manon tra la truoj, por malfermi la fenestron. Aŭdante brueton interne, li silente foriris por havigi helpon.

Dudek najbaroj kaj kelkaj aŭtomobiloj lokis sin ĉirkaŭ la domo, kaj policano eniris tra la fenestro por esplori.

Profunda silento regis. La amaseto streĉe atendis. Subite la policano ridante aperis ĉe la fenestro kun birdo en la mano: la birdo estis « karkaburra », el speco de ridantaj birdoj. Ĝi estis fluginta kontraŭ la fenestro fermita; la fenestro estis rompiĝinta, kaj la birdo estis vaganta tra la domo.

La policano liberigis la « ŝteliston », kaj ĝi flugis al alta stango, de kie ĝi alrigardis la homamason; kaj tiu birdo ekridis laŭte kaj longe.

W. F. Holloway, Melbourne.

★

## LI NE ŜATIS PAROLADOJN.

La konata germana humorista pentristo kaj poeto Wilhelm Busch tre malŝatis longajn paroladojn. Okaze de lia 70-a naskiĝotago liaj amikoj kaj adorantoj aranĝis pro li festenon, dum kiu estis farataj multaj tostoĵ kaj paroladoj.

Busch paciencie aŭskultis, dume malpleniĝante sian glason. Iu flustris en lian oreilon, ke ankaŭ li nun devas ion diri.

La jubileulo suspiris, ekstaris, tinte batetis per kulerejo kontraŭ sia glaso kaj, kiam ĉies okuloj atenteme estis direktitaj al li, li vokis:

— Kelnero, glason da biero!

## Komikaj kosmetikaj kutimoj de la simioj kaj kastoj de Hindujo

Hindujo estas lando de simioj. Ili loĝas en la arboj ĉirkaŭ niaj domoj kaj estas terura turmento. Se la pordo de la domo restas malfermita, ili eniras kaj ŝtelas nian manĝon. Se la infanoj iras ekstere kun manĝaĵo en la mano, ofte venas la simioj kaj forprenas la manĝon el la manoj. Kiam ni faras ĝardenojn, la simioj eltiras la legomojn. Ili ŝtelas la fruktojn el la arboj kaj eltiras la tegolojn de la tegmentoj de niaj domoj. Kiam ni vojaĝas per trajno, la simioj grimpas sur la vagonojn, eniras kaj prenas niajn monujojn aŭ malgrandajn paketojn, se ni ne bone gardas ilin, dum la trajno haltas ĉe la stacidomoj. Ili estas tre rapidaj.

Cu simioj havas kosmetikajn kutimojn? Jes, ili havas siajn proprajn kosmetikajn kutimojn. Kiam ni veturas per aŭtomobilo laŭ la vojoj, ni vidas multajn simiojn. Ili loĝas en la arboj apud la vojo. Multaj el ĉi tiuj simioj havas ruĝajn vizaĝojn. Ili estas la inoj. Ili prenas ruĝajn berojn el la arboj kaj frotas ilin sur la vizaĝo. Eble la virinoj de aliaj landoj lernis de la simioj la kutimon uzi ruĝon, aŭ eble, laŭ la teorio de evolucio, ili devenis de la simioj.

En Hindujo ekzistas ne nur kvarpedaj simioj, sed ankaŭ ekzistas dupiedaj « simioj », kiuj havas siajn proprajn kosmetikajn kutimojn. Inter la hinduoj ekzistas multaj diversaj kastoj, kaj oni povas distingi ilin per la kastaj signoj sur la frunto. Jen mi aldonas malgrandan skemon pri tio.

Numero 1 estas la signo de la kasto de orajistoj — tri blankaj kurbaj linioj trans la frunto.


Numero 2 estas la signo de la Saivoj-Hinduoj — tri rektaj blankaj linioj trans la frunto.

Numero 3 montras rondan makulon, kiu estas ruĝa kaj kelkfoje nigra; la virinoj portas ĝin sur la mezo de la frunto.

Numero 4 estas nigra punkto bruligita en la haŭton meze de la frunto; ankaŭ tiun signon portas virinoj.

Numero 5 estas blanka signo sur la frunto portata de la Marathi-popolo.

Numero 6 (blanka kaj ruĝa) estas la signo de unu klaso de Braminoj, kiu estas nomata « Achariar »; ili skribas « achariar » post sia nomo, ekzemple : « Viraraghavachariar ».



Numero 7 estas la signo de la Iyengar-Braminoj; ili skribas « Iyengar » post sia nomo, ekzemple : Srinivasaraghavan Iyengar.

Numero 8 : La Naidu-popolo, kiu estas « Sudroj », portas tiun ĉi signon.

Ciu kasto kaj klaso havas sian propran signon, kaj ili estas fieraj porti signojn. Estas ankaŭ aliaj signoj; sed ĉi tiuj montritaj estas sufiĉaj kiel ilustraĵoj.

Nun eble vi demandos pri la materialo, el kiu oni faras la signojn. Ĝi estas tre simpla. Oni prenas la ekskrementon de bovo, kiam ĝi ekfalas, sekigas kaj poste bruligas ĝin. Tiam oni faras la cindrojn ruĝaj aŭ blankaj. Kiam ili metas la cindron sur la fronton, ili iom malsekigas ĝin. Portante sur la vizaĝo tiajn signojn, la homoj vere similas al la simioj.

Anena Christensen,  
Ambur, Suda Hindujo.

# H O L L Y W O O D

*Joseph R. Scherer*

De tempo al tempo kelkaj gesamideanoj plendis ĉe mi ke ofte filmoj el Hollywood ne estis amuzaj, aŭ estis tro amuzaj aŭ ke mankis vera enhavo aŭ ke ili estis nemoralaj.

Estas vere ke ne ĉiuj filmoj el Hollywood estas bonaj. Same ne ĉiuj filmoj el alilandaj filmfarejoj estas bonaj.

Tamen Hollywood donas al la mondo multajn bonegajn kaj valorajn filmojn. Ne ĉiuj libroj estas bonaj — kelkaj estas multe pli malbonaj ol estis la plej malbonaj filmoj iam faritaj. La saĝa homo pro tio ne rifuzas legi librojn entute.

Oni devas do elekti inter la plej bonaj libroj kaj filmoj. Kial forĵeti sian valoran tempon legante malbonajn librojn kaj vidante senvalorajn filmojn?

Por helpi al la legantoj en la malfacila decido, ĉu viziti multe reklamitan filmon aŭ ne, mi komencos verki mallongajn filmrecenzojn. Mi klopodos gajni la fidon de la gesamideanoj ĉiam dirante mian objektivan opinion.

Kelkaj filmoj estas vere grandiozaj laŭ fotografa vidpunkto; aliaj estas treege interesaj laŭ enhavo, aliaj estas amuzaj aŭ tragikaj; kelkaj filmoj montras historiajn okazintaĵojn, aliaj malproksimajn landojn.

Mi indkos per steletoj mian opinion pri la valoro de la filmoj: 5 steloj \*\*\*\*\* eksterordinara filmo; 4 steloj \*\*\*\* tre bona filmo; 3 steloj \*\*\* interesa kaj kontentiga filmo. Filmoj, kiuj estas tiel klasigitaj de mi, meritos viziton de ĉiu serioza homo. Mi kredas ke ne niu samideano estos malkontenta post tia vizito al la kinejo.

Mi ne kapablos viziti persone ĉiujn filmojn. Pri tiuj filmoj mi devas dependi de la opinioj de 3-4 usonaj filmrecenzistoj kiuj dum la lastaj 15 jaroj neniam seniluziigis min. Tamen la plej multajn klasigitajn filmojn mi mem vizitis.

Saĝa homo malofte komencas legi libron, se ĝi ne estas bone recenzita aŭ forte rekomendita de amiko, al kies opinio li povas fidi. Estas ja tro multaj bonegaj libroj! Mankas la tempo por legi eĉ ilin ĉiujn. Same estas tro multaj bonegaj, unuaklasaj kaj valoraj filmoj. Neniu utila homo kapablas vidi ilin ĉiujn!

Filmoj grandmezure instigis min fariĝi globtrotulo, verki librojn, fari lumbildparoladojn ĉirkaŭ la tuta mondo, propagandi Esperanton kaj laŭ mia malgranda kapablo servi al la plibonigo de la homaro pere de neŭtrala lingvo.

Kio estus la mondo hodiaŭ sen la filmo? La filmarto estas hodiaŭ same valora kiel la presarto. Filmoj same influas la homamasojn kiel libroj, radio, ĵurnaloj. Fakte multaj homoj, kiuj malofte legas libron, multe lernas pri la mondo irante al kinejoj.

Ni povas sidi en kinejo en la plej perdita v'laĝo ie en la mondo, kaj ni povas vidi kiel vivas la eskimoj en la nordo, la negroj en Afriko, la usonanoj, la sudamerikanoj, la hindoj... la loĝantoj en grandurboj, kaj la kamparanoj en Ĉinujo. Ni aŭdas ilian muzikon, ni travivas iliajn ĝojojn kaj dolorojn. Filmoj montras tion ĉion al ni multe pli bone ol tion povus klarigi libroj.

Ni vidas kiel venkas sportistoj, kiel kroniĝas nova papo, kiel revenas Howard Hughes de rapida aera mondvojaĝo, aŭ kiel dormeme sin balancas la altaj palmoj sur Cejlono en tropika venteto sub argenta luno. Ni vidas kiel devis batali sukcesaj homoj kiel Emil Zola, Pasteur, Curie kaj multaj aliaj. Ofte mi venis hejmen kun la firma decido lerni pli multe, kaj labori pli forte por sukcesigi mondpacajn ideojn kaj idealojn.

Do en venontaj artikoloj sekvos informoj pri la plej bonaj filmoj el Hollywood kaj kelkaj personaj spertoj kun filmsteloj.


# Enigma Konkurso n-ro 3

Niaj du unuaj konkursoj estis destinitaj precipe por eŭropanoj, ĉar la fiksita limtempo por ensendo de la solvoj permesis nur al nemultaj ekstereŭropanoj, ĝustatempe ensendi la solvojn. Tial la nuna konkurso estas destinita ekskluzive por gesamideanoj loĝantaj ekster Eŭropo. Solvoj de la hodiaŭaj enigmoj devas alveni ĝis la 25-a de aŭgusto al la adreso de s-ro P. H. Mocij, Rue Defacqz 78, St.-Gilles, Bruselo, Belgio. Ne direktu solvojn al nia redakcio! Komprenible ankaŭ eŭropanoj povas (eksterkonkurse) ensendi siajn solvojn.

Por la ĝusta solvo de la hodiaŭaj enigmoj ni fiksis la jenajn premiojn: 1. Katoluna Antologio, 2. Gaja knabo (de Bj. Björnson), 3. Veterano (de Gomes Braga). La solvojn de la enigmoj kaj la nomojn de la premiitoj ni publikigos je konvena tempo.

## KRUCVORT-ENIGMO.

Jen la signifo de la vortoj serĉotaj; la litero « r » inter krampoj (r) signifas, ke oni devas preni nur la radikon de la koncerna vorto.



Horizontale: 1. arbo; 5. plenumi taskon; 10. senti impreson de surprizo (r); 12. deziri (r); 13. sufikso; 15. barilo (r); 18. prepozicio; 19. katolika diservo (r); 21. malhelpilo (r); 22. rapide moviĝi (r); 23. ŝatata persono (r); 25. poseda pronomo; 26. kurmaniero de ĉevaloj (r); 27. geografia karto (r); 29. el multekosta metalo; 30. sportejo; 32. teksaĵo el lino (r); 33. frakcio; 35. grava sangotubo (r); 37. fari ion kio estas ordonita (r); 39. skribmaterialo; 41. numeralo; 42. malhumile postuli; 44. kurb-linio (r); 45. korelativo; 46. malofta; 48. korelativo; 49. prepozicio; 50. birda produkt-aĵo; 52. kion administrantoj de gazetoj volonte akceptas; 53. provi (r).

Vertikale: 1. tuto de atmosferaj kaj veteraj cirkonstancoj de iu regiono (r); 2. sufikso;

3. kurba ostoj (r); 4. dekpieda krustulo (r); 5. garantio deambio per akcepta subskribo (r); 7. fari tratuon per pinta ilo (r); 8. konjunkcio; 9. senenergia; 11. kion viroj ne faras; 14. juvelo (r); 16. malfacile paŝanta pro kripleco de kruro (r); 17. poseda pronomo; 18. paro; 20. harmonio rezultanta el regula aranĝo de partoj (r); 22. tia skribo rapide malaperas; 24. malgranda plezurboato (r); 26. pene tiri post si; 28. fonto de elekto (r); 29. lirika poemo; 31. akre kritikanta kun iom da moko; 34. insigno portata sur la ĉapelo (r); 36. metalo; 37. kiel 36 vertikale; 38. granda; 40. laŭte voki (r); 42. sovaĝa porko; 43. statuoj, figuro de diaĵo (r); 46. prepozicio; 47. parenco; 49. prepozicio; 51. sufikso.

## KAS-ENIGMO.

Kiuj bestnomoj estas kaŝitaj en la subaj frazoj?

La policisto, aŭdinte pri la rabo, vokis helpanton.

Li hieraŭ postulis de mi guldenon.

En tiu aleo ni do renkontos unu la alian.

Kiam la patrino diris, ke malpuriĝis lia jako, li brosis ĝin.

Eksciuj rosti bifstekon, antaŭ ol edziniĝi!

Pri ĉi tiu tezo komenciĝis vigla debato.

Ŝia iom fantoma robo ne plaĉis al mi.

Li eraris, kaj subtrahis tri kopekojn de la konto.

La knabo, kiun oni tiris el la putoj, rompis sian kruvon.

## SOLVOJ

### de la konkurso n-ro 1.

Alvenis entute 69 solvoj (inter ili 41 korektaj) el 18 landoj. La loto destinis la premiojn al jenaj solvintoj: 1. S-ro E. Schmidt, Nancy, Francujo; 2. S-ro I. Dratwer, Warszawa, Polujo; 3. S-ro Giovanni Della Savia, Udine,

## SILAB-ENIGMO.

Ludoviko; mentono; kravato; argumento; gravuri; krizantemo; katafalko; ekzerci; ar-seniko; spontanea; hipotezo; profesoro, mar-

# Rido Sanigas

## EMBARASIGA DEMANDO

- Paĉjo!
- Ne ĝenu min, mi ne havas tempon.
- Paĉjo, ĉu mi povas al vi ion demandi?
- Mi nun ne havas tempon.
- Sed mi nur volas ion demandi al vi.
- Nu, kion do? Ĉu grave?
- Jes, mi volonte sciis, kion faras la vento kiam ĝi ne blovas.

## BLOVIS PLI FRUE

La bestkuracisto klarigis al la kamparano, kiamaniere li devas doni la medicinon al sia ĉevalo.

— Metu la pulvoron en pecon da gastubo kaj blovu ĝin tiel en la gorĝon de la besto!

Kelkajn horojn poste revenis la kamparano preskaŭ svenante.

— Kio okazis? demandis la bestkuracisto.

— Ha, mi mortos, diris la kamparano. — La ĉevalo blovis pli frue ol mi...

## ĈU EKZISTAS?

Li: Kiajn virojn vi virinoj do ŝatas: la egoistajn aŭ la alispecajn?

Ŝi: Kiajn alispecajn?

## NEBULITA

— Ĉu hieraŭ nokte vi estis en la drinkejo?

— Jes, certe.

— Ĉu ankaŭ mi estis tie?

cipano; artilerio; konkeri; almanako; violono; geometrio; koridoro; martelo; vikario; haringo; pensiono. — Internacia Esperanto-Ligo. Italujo.

## KRUCVORT-ENIGMO.

p a s i o k t a m e n  
 o i n d u l g e m a o  
 m a l t o a d i n a r  
 p r a r a s p i a r d  
 a l b o k r d o k o  
 e f r a t e t o i  
 a k r e p p r i p o  
 e r e a l a r m e  
 o n d i r r o s l o  
 p o r l i l i a o a z  
 a n o d o a l o n g o  
 l g a r n i t u r o n  
 o l i n d k d o r m o

## Laŭ melodio amata:

### LA BELA POLINO

(Melodio de C. Millöcker, el la opereto

« Der Bettelstudent ».)

*Laŭ cirkonstancoj kaj inklinoj*

*La mondon travojaĝis mi*

*Kaj la belecon de l' virinoj*

*Mi ĉie studis kun pasi'.*

*De orient' kaj suna sudo*

*Al okcident' kaj neĝa nord'*

*Mi sekvis al la koro-trudo*

*Kaj donis hisojn en rekord'*

*Fariĝis amo-paradizo*

*Al mi ĉe mia veno tuĝ*

*Londono, Rom', Vien', Parizo*

*Kaj eĉ Afriko kaj Hinduj'.*

*Virinoj ensorĉigis min,*

*Sed kiom ajn en ĉiu lando*

*Mi devas diri ĉe demando:*

*Plej al mi plaĉis la polin'.*

*Se sidus en konkursa rondo*

*Kun la polino tie ĉi*

*La belulinoj de la mondo,*

*La kronon donus mi al ŝi.*

*Jen greka nazo, buŝ' Pariza,*

*De l' hispanin' okul-ĉiel',*

*Britin-figuro paradiza*

*Kun piedeto de anĝel'.*

*Kun ŝia propra ĉarmo slava*

*— Mi ĝin konstatas kun plezur' —*

*Sin miksis ĉio sorĉe rava,*

*Ja ĉiam iu parto nur,*

*Sed eble ĝuste do pro tio*

*Nin tiel plaĉas la polin'.*

*Jes, venu mem al Varsovio,*

*Per propra vid' konvinku vin!*

Karl VANSELOW.

## TEMPESTO.

Dum iu el la lastaj tempestaj noktoj, policano trovis viron « iom » ebrian, sidantan sur la seĝo de sia domo.

— Sed, sinjoro, kial dum tia tempesto vi ne iras internen? demandis la pol'cano.

— Ĉu tion vi nomas tempesto. Kerra amiko? respondis la viro. — Vi do eĉ ne diuone supozas, kia tempesto pendas super mia kapo tie interne!

# Internacia Esperanto-Ligo

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, (Herts.), Anglujo

## OFICIALA INFORMILO

N-ro 117. 3an de Majo 1939.

### NOVAJ DELEGITOJ.

#### Argent'no

Tartagal. D : D-ro J. Miguel Reyes, Farmacia « Reyes », Tartagal (Salta).

#### Aŭstralio

Hobart. D : J. Couche, Anglesea Barracks, Hobart, Tasmania.

#### Nederlando

Kortgene. D : Z. C. Salomé, Torendijk 321c.  
 Midde.burg. FD (Instruado) : G. F. Maris, Park De Griffioen 4.

#### Polujo

Warszawa. FD (Teknika komerco) : S. Okónski, Józefów kolo Otwocka, via Warszawa, ul. Lesna 5.

#### Slovakujo

Bratislava. FD (Turismo) : S. Szeemann, Kempelenova ul. 10.

#### Usono

Emory Univers'ty. D : R. A. Bays, Emory University, Georgia.

Sharon. D : H. R. Arnold, 203, Daugherty Ave., Sharon, Pa.

### ŜANGOJ.

#### Argentino

Esperanza. D : adresŝanĝo : 3 de Febrero 256.

#### Britujo

Ba'h. D : adresŝanĝo : 37 King Edward Road, Oldfield Park, Bath.

#### Francujo

B'schwiller. D : vakas pro translokiĝo.

Epernay. D : adresŝanĝo : 69 rue Thiercelin.

Jeumont. D : vakas pro translokiĝo.

Le Cannet. D : vakas.

#### Hungarujo

Ujpest. D : adresŝanĝo : Nagyszombat u. 11.

#### Jugoslavujo

Zagreb. FD (Kemio) adresŝanĝo : ĉe D-ro Lappenna, Dezeliĉeva 44.

#### Nederlando

Arnhem. D : adresŝanĝo : Amsterdamseweg 78.

#### Polujo

Swieciany. D : adresŝanĝo : Dworcowa la.

### MEMBRO-SUBTENANTO.

Bonvolis aliĝi kiel Membro-Subtenanto :  
 69. S-ro L. Margotteaux, Liège, Belgujo.

## MONATA STATISTIKO.

Membraro. Jen la stato de la pagitaj kotizoj ĝis la fino de Aprilo, kaj ankaŭ, por komparo, ĝis la fino de Aprilo 1938 :

	Aprilo 1938	Aprilo 1939
Asociaj Membroj ...	4197	4563
Individuaj Membroj :		
MJ .....	928	1005
MA .....	865	861
MAH .....	283	347
MS .....	121	67
Pat. ....	7	14
DM .....	72	72
HM .....	29	30
	— 2305	— 2396
	6502	6959

### Korespondajoj.

Centra Oficejo (sen la gazetoj) dum Aprilo 1939 :

Ricevitaj .....	412
Senditaj .....	2055
	2467

Cecil C. GOLDSMITH,  
 Generala Sekretario.

★

## OFICIALA INFORMILO

N-ro 118. 10an de Majo, 1939.

### NOVAJ PERANTOJ.

Bulgarujo : St. Minkov, 129 rue Sredna Gora, Sofia,

Slovakujo : Ministerstvo dopravy odd. II/3, Bratislava,

al kiuj membroj en la koncernaj landoj povas pagi la kotizojn.

### NOVAJ DELEGITOJ.

#### Francujo

Gien (Loiret). D : M. Chailloux, 69 Rue Bernard Palissy.

Lille (Nord). D : M. Volqueman, 36 Rue Turgot.

#### Madagaskaro

Antsohihy. D : R. Martin, Adjoint des Services Civils.

#### Svedujo

Eslov. D : E. Eriksson, Kanalgatan 10.  
 Falsöp'ng. D : N. Sigurd, Berzeliigatan 17.



## SANGOJ.

## Brazilo

**Baurù.** (Sao Paulo). D : adresŝanĝo : Rua 1 de Agosto, Vila Norceste No. 7.

## Britujo

**Birmingham.** FD (Asekuro) : adresŝanĝo : 244 Quinton Road, Harborne, Birmingham 17.

## Francujo

**Vienne.** Pro la bedaŭrinda morto de S-ro Uline provizore ne estas D.

## Hindoĉinujo

**Haiduong.** D. vakas.

## DUMVIVA MEMBRO.

Aliĝis kiel Dumviva Membro :  
F-ino C. Williams, Papuo.

**JARLIBRO.** Ĝi estis preta je Pasko, kaj tiutempe estis ĉe la presejo la adresitaj etikedoj por la dissendo al la pagintoj. Maigraŭ oftaj plendoj niaflanke la presistoj tre malrapide dissendis la ekzemplerojn. Ili informis nin, ke ĉiuj foriris antaŭ la fino de Aprilo. Se iu, kiu jam pagis la kotizon, ne ricevis ĝin, li bonvolu sciigi tion al ni.

Cecil C. GOLDSMITH,  
Generala Sekretario.

★

## Internacia konkurso 1939

Stato je la 30a de Aprilo, 1939.

	Poentoj		
	Elirbazo	1939	0/0
1. Portugalujo .....	303	634	209.2
2. Finnlando .....	250	394	157.6
3. Jugoslavujo .....	694	846	122.0
4. Brazilo .....	429	506	118.0
5. Hungarujo .....	574	626	109.1
6. Britujo .....	6594	6347	96.2
7. Aŭstralio .....	489	471	96.1
8. Polujo .....	683	631	92.4
9. Svisujo .....	693	635	91.6
10. Danujo .....	1038	943	90.8
11. Nederlando .....	3253	2565	78.8
12. Belgujo .....	1747	1314	75.2
13. Francujo .....	5503	3950	71.7
14. Nov-Zelando .....	444	297	66.9
15. Usono .....	1597	1065	64.8
16. Svedujo .....	3215	2066	64.2
17. Argentino .....	309	187	60.5
18. Italujo .....	561	313	55.8
19. Grekujo .....	250	130	52.0
20. Norvegujo .....	1060	528	49.6
21. Hispanujo .....	885	419	45.1
22. Japanujo .....	517	227	41.0

La direktoro de grava ĵurnalo  
fervora Esperantisto

« O Povo » (La Popolo), grava ĉiutaga vespera ĵurnalo portugallingva, fondita en 1928, en Fortaleza (ĉefurbo de la ŝtato Ceará en Brazilo), vigle propagandas Esperanton (senpage), ĉar ĵurnalisto Democrito Rocha, ĝia direktoro, kaj deputito en la brazila Parlamento ĝis 1937, estas « veterano » de la Esperantomovado, de 1909. — La agado de s-ano D. Rocha certe meritas dankon kaj imiton.

## Estu Varbgarantianto!

EĈ LA DIO DE LA MILITO  
ESPERANTON NE LIKVIDOS.

**Marso :** Je diablo!! Ŝta'ojn kaj popolojn mi neniigis, kaj mi ne kapablas likvidi tiun ĉi bubon ?

**La spitantaj junuloj IEL, reprezentanto de la Esperantomovado (ridante) :** Hahahaha! Ne subtaksu min — mi certe ja intencas transvivi vin!

# ONI ANONCAS

## La prezo de anoncetoj

estas egalvaloro de 0.60 ned. guldeno, por la unuaj 20 vortoj aŭ mallongigoj; por ĉiuj pliaj 10 vortoj komencitaj 0.30 guldeno. La anoncetoj aperas en la semajna kaj (laŭ la disponebla loko) monata organoj de Internacia Esperanto-Ligo, nome en « Heroldo de Esperanto » kaj « Esperanto Internacia ». Por mendi anoncetojn, oni turnu sin al la Administracio de **Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando; nederlanda poŝtgiro 1306.30 ('s-Gravenhage)**. Familiaj anoncoj senpage.

**Naskiĝo Fink.** Pierre André Fink, filo de la direktoro de l' Vojaĝoficejo de « La Vigie Marocaine » kaj de nia kunlaborantino s-ino Irène Fink, en **Casablanca**, Maroko, ricevis la 21.4. fratineton, nomitan Georgette! — Plej koran gratulon!

**Honorigo.** D-ro Robin en Varsovio, prezidanto de la Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio, estas nomita « Korespondanto de la Pariza Medicina Societo » pro siaj tre ŝatataj verkoj koncerne la gastrologion. — Tre sincerajn gratulojn!

**30-jara jubi'eo.** Tiel maloftan jubileon festis la 20.5.1939 la Esperanto-grupo « Komprenado faras pacon » en **Haarlem**, Nederlando. — Nian koran gratulon!

**Hôtel du Nouveau Monde**, 98 rue de Cléry, Paris 2. Centro de Paris, ĉe grandaj bulvaroj. Fluanta varma kaj malvarma akvo en ĉiuj ĉambroj. Prezoj : 18.00 ĝis 35.00 fk. nokte. — Rendevuo de Esperantistoj.

**Al kiu ni iru? Al Kristo!** Radio-prediko de fama usona pastro. Mendu de : Lutheran Center, **Detroit**, Michigan, Usono. (Respond-kupono.) (595)

**Librejo « Frateco », Sevl'ivo, Bulgarujo**, liveros al vi ĉiujn Esperantajn kaj ankaŭ ĉiujn librojn, kiuj aperis en Bulgarujo pri aŭ en Esperanto. **Postulu senpagan katalogon!**

**La gazeto « Frateco »** estas la plej malmultekosta esperanta gazeto. Ĝi estas lumturo de nova scienco, paco kaj racia vivo. Postulu senpagan provekzempleron de : « **Frateco** », **Sevl'ivo, Bulgarujo**.

**Ni fondis grupon en Oulu** kaj por certigi gekomencantojn pri uzebleco de Esperanto sendu al ni Esperanto-gazetojn kaj ĉiuspecajn Esperantajn! Adreso : S-ro Y. Kuorikoski, Tuuran Veistokoulu, **Oulu**, Finnlando.

**S-ro Poul Möller**, Oster Rindom, Ringköbing, Danlando, 27-jara oficisto, deziras korespondi per poŝtkartoj kaj leteroj kun ĉiuj landoj. Certe respondos.

**200 gesamideanoj** ĉe Koresponda Grupo, Boujousjō-Kita, **Kioto**, Japanujo, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustritaj kaj interŝanĝi gazetojn kun gesamideanoj el ĉiuj landoj.

**Sola fraŭlino**, bank-oficistino, 40-jara, inteligenta, de bela apero, serĉas ĝentilan edzon. Milada Poláková, Nerudova ulice 1570, **Par-dubice**, Protektorato Ĉehomoravio, Gr. Germanujo.

**Samideanoj!** Kiu volas varbi esperantiston en 1939? Skribu al mi! Mi deziras korespondi per leteroj pri muziko, literaturo kaj entomologio por perfektigi min. F. Matz, Lilleengen, **Spro pr. Oslo**, Norvegujo.

**Juna belga esperantisto** deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun eksterlandaj gesamideanoj. Respondon certigas : Jozef Kempenaers, Hoogstraat 16, **Schriek**, Belgujo.

**Kelkaj gekomencantoj** deziras korespondi kun gesamideanoj en la tuta mondo, precipe en **Finnlando**. Respondo garantiata. Skribu al : F-ino Anna Dahlgren, Thorsgatan 4 B, **Sundsvall**, Svedujo.

**Protektorato Ĉehomoravujo**, V. Kazda, Sidonova 632, **Jičin**. — Kiu al mi sendos 2 (3) internaciajn respond-kuponojn, tiu tuj ricevos 125 (180) belajn poŝtmarkojn, precipe ĉehoslovakajn.

**Esperantistoj!** Poŝtmarkojn mi deziras el ĉiuj landoj, kaj mi sendos samkvanton da svedaj poŝtmarkoj. Fervojiŝto Ernst Andersson, Spannmålsgatan 5, **Trollhättan**, Svedujo.

**Deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn** kun ĉiuj landoj; nepre respondos. Donna Weaver, komencanto, Rt. 7, Box 453, **Phoenix, Arizona**, Usono.

**Deziras korespondantojn** el ĉiuj landoj por 80 ĉeĥaj kaj belgaj ĝelernantoj, F-ino De Weerd, Jozef Braetstraat 69, **Oudenaarde**, Belgujo.

**Korespondado.** 62 gesamideanoj deziras korespondi kun ĉiuj landoj. Skribu amase, tutkore ni tuj respondos. — Esperantista Grupo, **St. Léonard** (Haute-Vienne), Francujo.

**Miaj 56 gelnernatoj** (15-42 jaraj) deziras korespondi. Sendu vian foton, se eble! S-ro S. J. Assayag, Rue du Lt. Brasillach, **Port Lyautey**, Maroko.

**S-ro Josef Maly, O. Z. H., Mnichovo Hradiště** (Bohemio, Centra Eŭropo) interŝanĝas neuzitajn kaj uzitajn poŝtmarkojn senmakulajn. Korespondado flugpoŝta esperante, france, angle, germane, hispane.

**Atanas Stefanov, instruist, S. Ferdinando, Ok. Karnobatska**, Bulgario, deziras korespondi kun fremdlandanoj pri ĉiuj temoj. Certe respondos.

**Belgaj fraŭlinoj** : dentistino kaj instruistino, deziras korespondantojn ĉiulandajn. Emmy Müller, dentistino, kaj Louisa Van Hauwermeiren, ambaŭ : Rue Robiano 11, **Borsbeek-Anvers**, Belgujo.

**La memoron plifortigas D-ro D. Fajŝtejn, Vilno** (Pollando), Zawalna 15. — Postulu senpage detalajn prospektojn de mnemonika perkoresponda kurso en Esperanto! (590)

**Kvakerismo kaj Paco.** Por senpagaj ekzempleroj de literaturo (Esperanta kaj angla) skribu al Friends Service Council, Friends House, Euston Road, **London N.W. 1**, Anglujo. (432)

**Samideanoj de la tuta mondo! Kiu helpos?** 30-jara judo kun edzino, el Slovakujo, sufiĉe bone aspektanta, parolas slovake, germane, hungare, esperante, iomete angle, perfekta aŭtoŝoforo, serĉas iun ajn laboron en lando, kie judo havas ankoraŭ rajton vivi. Ankaŭ transmare. Afablajn proponojn direktu al la redakcio de ĉi tiu gazeto, sub ĉifro « Eapraha 12-39 ».

**Gejunuloj kaj pacamantoj!** Kuraĝigu novan klason! Poŝtkartojn kaj leterojn sendu tuj al la Pacinstituta Esperanto-Grupo, Schauffler College, **Cleveland, Ohio**, Usono. — Ĉiu skribinto ricevos personan respondon kaj institutan bultenon.

**Kiu kunmarŝos?** Du junaj samideanoj deziras libertempi marŝante alilande kun ne-angloj, 5-12 aŭgusto. Interesatoj skribu al : 104 Haddenham Rd., **Leicester**, Anglujo.

**Dana ĝardenisto deziras korespondi** kun gesamideanoj tutmondaj per angla, germana aŭ Esperanta lingvoj. Verner Nielsen, ĉe Brdr. Hansen, **Søhus**, Danlando.

**Rotarianoj!** — Skribu tuj al Rotary International Convention, **Cleveland (Ohio)**, Usono, kaj sugestu ke oni pretigu Esperanto-servon por eksterlandaj kongresanoj. Kunvenontoj bonvole senhezite sin anoncu al la Cleveland'a IEL-delegito. (591)

**Fumantoj!** — Vi povos tuj ĉesigi fumadon, uzante « NEOSTOM ». Ĝin vi povos aĉeti, sendante 30.— italajn lirojn aŭ egalvaloron al « Istituto Chimico Terapico », Via Ghiacciana, **Verona**, Italujo. (592)

**Atentu! Kongresanoj**, irontaj al aŭ revenontaj de Bern kaj trapasantaj la malnovan Goethe-urbon Frankfurt a. M., estas petataj sin turni al C. Barthel, Wöhlerstr. 14, **Frankfurt a. M.**, Germanujo, — kiu volonte helpos ilin kaj montrus al ili la urbon. (593)

**Nekatolikoj** senpage povas ricevi informojn pri la katolika kredo ĉe la « Internacia Katolika Informejo », Fraterhuis, de Vliert, 's-Hertogenbosch, Nederlando. (526)

**Poŝtuko kun verda stelo**, el japana altkvalita silko, 7.50 jenoj por duon-dekduo, afrankite. Mendu ĉe : Daikokuya, Minamitamati 108, **Kioto**, Japanujo. (586)

## La libroj de Literatura Mondo,

de Eldona Societo Esperanto, de Esperantista Centra Librejo, de Brita Esperantista Asocio, de Esperanto Publishing Company, de Moraviaj Esperanto-Pioniroj, de Itala Esperantista Federacio, de S. A. T., de J. Muusses, ktp. estas haveblaj ankaŭ de nia Librofako. Kun plezuro ni atendas viajn mendojn.

HEROLDO DE ESPERANTO  
SCHEVENINGEN (NEDERLANDO)

# T. A. G. E.

Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj.  
Fondita 1924.

## INSTRUISTOJ

aliĝu al T.A.G.E. por subteni la propran fakorganizaĵon kaj por ricevi la tre utilan fak-organon

## INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

*Kotizo 2.50 ned. guld. Por individuaj membroj de I. E. L. 2 guld.  
(Pagebla pere de la Ĉefdelegitoj kaj Perantoj de I. E. L. — escepte en Nederlando).*

Petu prospekton kaj prov-ekzempleron de I. P. R. ĉe  
TAGE-oficejo, Schoolstraat 13, Veendam, Nederlando.

## KURACISTOJ

aliĝu al via propra fak-organizaĵo

# T. E. K. A.

Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio  
Fondita 1908

*Kotizo : 4 anglaj ŝilingoj  
(Pagebla pere de la Ĉefdelegitoj kaj Perantoj de I. E. L.)*



Plena informo ricevebla ĉe  
D-ro P. KEMPENEERS, 19 Avenue Montjoie, Uccle 3, Belgujo.

